REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 6 (67) decembro 2011*

en la numero

Kampanjo 125
Lingvaj Festivaloj en Ĉeboksari kaj Moskvo
rakonto pri la 27-a REK
protokolo de la Konferenco de REU
aktivadoj de jekaterinburgaj kaj vladivostokaj esperantistoj
literatura konkurso de "Impeto"
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2011

enhavo

01 Marĝene de la Lingva Festivalo
03 Balado pri bierrevuloj
06 Eŭropa Tago de Lingvoj en la Usona Kultura Centro en Moskvo
07 La 1-a Moskva Lingva Festivalo por lernejanoj
09 Sufiksaj E-vortoj mankaj en la rusa lingvo (parto 4)
16 La lasta aljuĝo de Thorsen-premio
17 Du Esperanto-kursoj en Jekaterinburg
19 Seminario pri libera scio: kulturo de disdonado
20 Kampanjo 125
20 Distribuo de taskoj kaj funkcioj de REU
21 Protokolo de la 26-a Konferenco de REU
27 UEA kun pli da membroj ol lastjare kaj 2500 amikoj en Facebook
27 UEA kaj TEJO aktivas ĉe Unesko
28 Novaj REU-membroj por 2011
29 Kotizoj de REU/REJM por 2012
30 Vojaĝo al la lando de matena freŝeco
32 Malferma Tago: omaĝo al Sekelj, repremiero de historia filmo
33 Mia partopreno en io ĝis nun nevidita
35 Atentu literaturan konkurson
35 IKU invitas prelegontojn
36 Belartaj Konkursoj de UEA en 2012
12, 28, 31 Anekdotoj
k3 Fotoj de la Lingvaj Festivaloj en Ĉeboksari kaj Moskvo
k4 Amuzaj misskriboj kaj eraroj
k4 Feliĉan Novan Jaron al Ĉiuj!

Ne forgesu (re)aboni REGon

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 6 (67) decembro 2011

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Griŝin

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2012:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 500 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва
por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*

elektronika abono *– 200 rub. (5 eŭroj)*

MARĜENE DE LA LINGVA FESTIVALO

En la antaŭlasta semajnfino de oktobro mia bonanima fortuno kaj mia estimata REU donacis al mi taŭgan kaŭzon por, post dekjara paŭzo, refoje viziti la ĉarman ĉefurbon de Ĉuvaŝio. En Ĉeboksari devis okazi la aranĝo, jaron antaŭe planita de REU, nome la vica Rusia Esperantista Kongreso (REK). Enkadre de tiu devis okazi suplementa programero – la vica Lingva Festivalo (LF). Efektive, okazis kaj tio kaj tio, sed la rezulta valoro de ambaŭ aranĝoj, miaopinie, estas tute renversa.

Cetere, mi absolute ne havis ŝancon promeni en Ĉeboksari, kion mi ege bedaŭras, ĉar la urbo sendube indas atenton de nehasta promenanto. Mankis la tempo. Tuj el la vagono mi estis prenita kaj veturigita en la komunloĝejon. Tuj post la enloĝiĝo buseto veturigis min kun ĉiuj aliurbaj kongresanoj al mia prezentado de la eldonejo "Impeto". Post ĝi, kiam ceteraj aliurbanoj ekskursis, mi uzis duhoran paŭzon por prepari min al la koncerto. Iam en la temperoj antaŭ tio mi sukcesis ĉeesti ankaŭ la lingvan konkurson – la unuan aranĝon de LF. la sekvan matenon – tuj al la kunsido de REU-Konferenco, poste – tuj al la solena malfermo de LF. Post tiu – tuj al mia prezentado de la jida lingvo. Post la prezentado – tuj al koncerto de Maŝa Koĉetkova. La lastan dimanĉan matenon denove – tuj al la konferenca diskuto. Poste – tuj al mia dua prezentado. Poste – tuj al la fermo de LF kun la Internacia koncerto. Kaj, post hasta tagmanĝo – ree en la trajnvagonon. Ĉio en tiuj tri tagoj okazis haste kaj tuje – fakte tiaspeca vivoritmo plaĉis al mi. Plaĉis ankaŭ la komunloĝeja lito, kien mi plonĝis laca ĉe la noktomezoj por tuja (ho – denove!) ekdormo ĝis la mateno.

Nun mi demandas min, kio do okazis en Ĉebo? Jes ja, okazis la tradicia LF, tre zorgeme preparita de la loka teamo, plejparte esperantista, gvidata de Aleksandr Blinov. La teamo antaŭvidis ĉion. Ekipo de prezentejoj en la "prezidanta" gimnazio kontentigus la plej postuleman prezentanton de iu ajn lingvo, kiu, ĉe bezono, povis senprokraste ricevi subtenon de lertaj teknikistoj. Programlibretoj, reklamiloj, brustoŝildoj por la prezentantoj kaj por la gastoj, bluaj plastaj ŝuingoj – ĉio ĉeestis en bezonata kvanto kaj ĝustatempe. Ankaŭ la plej grava gravaĵo – la lingvoprezentantoj. Ĉu bonŝance, ĉu speciale invititaj, sed ili estis la plej taŭgaj por siaj prezentoj: la italan prezentis italoj (cetere, esperantistoj), la grekan – juna grekino, la flandran – flandro, la germanan – germano, esperanton – neevitebla kaj neanstataŭebla Garik kaj itala samideano Massimo Ripani... Certe bonŝance, sed ne spe-

dum la Konferenco de REU

ciale alvenis tre atentemaj, scivolemaj kaj demandemaj aŭskultantoj. Almenaŭ mi, dum ambaŭ miaj prezentoj havis plenan prezentejon da ĝuste tiaj... Plej kortuŝis min la afablega sinteno de ĉiuj organizantoj, homoj absolute nekonataj por mi. Eĉ kiam mi kun Svetlana Smetanina tute spontane decidis aranĝi libroservon ene de LF kaj petis tablojn por meti la librojn, la tabloj estis senprokraste alportitaj kaj eĉ kovritaj per verda tablotuko. Cetere, tiu libroservo estis la dua aranĝo, post Esperanto-prezentadoj de Garik, utila por konigi esperanton al la vizitantoj de LF. Tiuj are venadis al la tabloj, demandadis kaj aĉetadis la librojn. Ankaŭ la lastataga Internacia koncerto, kompilita vere internaciece, iel montris ĉeeston de Esperanto pro partopreno de Maŝa kaj mi. Nur la ĉefa aranĝo, la jarkunveno de rusiaj esperantistoj, restis tute ekster atento de la publiko, ĉar pasis marĝene de LF.

Mi supozas, ke estas nia granda bonŝanco tiu preteratento de la publiko. Kial? Ĉar la atento, se ĝi ial okazus, entombigus eĉ tiujn etajn ĝermojn de interesiĝo pri nia lingvo, kiujn semis la supre menciita esperantista ĉeesto en LF.

Kion oni atribuu al la senpera programo de REK? Du konferencajn kunsidojn. Prezentadon de la eldonejo. Busekskurson tra la urbo. Kaj du koncertojn – la mian kaj tiun de Maŝa Koĉetkova. Nu, en la kafejo, kie okazis ambaŭ koncertoj, estis promesita nur esperantista publiko, sed tio efektive okazis nur dum mia koncerto. Por la koncerto de Maŝa la kafejestro ofertis liberajn tablojn al lokaj drinkemuloj, kiuj, memkompreneble, ne bonigis la etoson. Tamen Maŝa digne elturniĝis en la situacio, prezentante, plejparte, kantojn ruslingvajn. Sekve, ŝian koncerton mi tamen apartigus.

Ĉu la du konferencaj kunsidoj, okazintaj sabate kaj dimanĉe, kun maksimume dek kvin voĉdonrajtaj partoprenantoj, vere respegulas la nuntempan staton de landa E-movado? Apenaŭ. Ĉe digna reklamado kaj agitado, ial okazigita dum la jaro tro pigre, almenaŭ la partoprenantaro povus esti multe pli grandkvanta. Sed mizera kvanto de la partoprenantoj estas ne la plej grava pravigo de mia “apenaŭ”. Pli gravas, laŭ mi, ia stranga indiferenteco, kiun la ĝisnuna Estraro de REU kunportis al la Konferenco. Almenaŭ per unu detaleto mi pravigu tiun tezon: ĉe ektrakto de la demando pri amendoj al Regularoj de REU, la demando, anticipe metita en la konferencan programon (!), evidentiĝis, ke mankas en la kunsidejo eĉ unu ekzem-

plero de la koncernaj Regularoj...

En majo 2010, dum la Konferenco en Sankt-Peterburg mi volonte voĉdonis por la nova, pli juna kaj, laŭ mi, vere perspektiva Estraro. Kion faris la novelektita Estraro dum la jaro kaj duono? Ion, certe, faris... Almenaŭ ĝi evidentigis, kiu inter la estraranoj emas labori kaj kiu ne emas. Ĉu oni devus ĉiokaze ŝanĝi la tutan Estraron? Mi opinias, ke ne. Eble la opinio estas iom paradoksa, sed mi estas certa, ke reelekto de la sama REU-Prezidanto estas bona decido. Ankaŭ la ŝanĝojn, faritajn en la konsisto de la Estraro, mi taksas pozitive. La novelektita Estraro havas bonan ŝancon rehabiliti la landan organizaĵon. Se la estraranoj, gvidataj de la Prezidanto, laboros pli sindone, pli inventeme kaj iniciateme. Sed ĉefe – se ili laboros **teame**, kaj sukcesos jungi al tiu teama laboro laŭeble pli grandan kvanton de REU-membroj. Nur tio povas pravigi utilon de la ekzistado de REU, kiun kelkiuj jam emas pridubi. Se ne okazos la mondofino, aŭgurita por 2012, ni povos vidi kaj taksi rezultojn de la laboro. Persone mi esperas pri bonaj – samkiel, verŝajne, ĉiu konscia membro de REU.

koncerto de Maŝa Koĉetkova

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

PS: Sekvante la diskutadon, lanĉitan en Libera Folio post la antaŭkongresa intervjuo de la REU-Prezidanto, mi estis ravita kaj mirigita pro lerteco de la esperantistoj, kiuj ĉiun ajn diskuttemon nepre venigas al la lingvaj problemoj. Ĉefe tiu ĉi miro provokis aperon de la kanteto, prezentita dum mia koncerto en Ĉeboksari. Por tiu ĉi kanteto mi inventis BREU – Bierrevulan Esperantistan Asocion. Ĉiuj aludoj kaj koincidoj estas tute hazardaj. Mi rajtigas ĉiun ajn muzikŝatanton senlicence kanti ĝin, uzante la melodion de la fama odesa kanto "Na Deribasovskoj otkrilasja pivnaja"(En Deribasovskaja strato ekfunkciis bierejo).

BALADO PRI BIERREVULOJ

En Ĉeboksari ekfunkciis bierejo –
por BREU-kongreso tute taŭga laborejo.
Renkontis gastojn tuj ĉe ties enirejo
senkulpa Griŝa – brava prezidant',

kiu, monaton antaŭ tiu jarkunveno,
konfesis pie al la Onda ĉefrabeno,
ke, ĉar la mondon kaptis anglalingva eno,
biero nia restis tute sen bezon'.

La ĉefraben' sugestis, ke, anstataŭ BREU,
prefere oni nun legombazaron kreu,
marĉandu verve kaj fojfoje laŭte veu,
ke en ĝardeno verda magras la rikolt'.

Grigorij jesis: – Efektive, estas vero!
Por BREU-anoj, flankiĝintaj de l' afero,
nun Esperanto gravas malpli ol biero,
do jam senfrukta preskaŭ estas la Ĝarden'.

La intervjuo, certe, sprita sed irita,
de l' ĉefrabeno estis tuj publikigita...
Ja foje l' vorto, malsingarde eldirita,
eksplodas brue, kvazaŭ atombomb'.

Kaj sen prokrasto el la dom' nemalproksima
replikis arde blogŝatanto, juna Dima,
ke l' intervjuo, eĉ se restu ĝi intima,
nek por bier' utilas, nek por Esperant'.

Sed la spertulo eksterlanda Fandi Prance
rebatis tuj, ke rajtas ĉiu senkvitance
ĉiun ajn temon trakti kante kaj eĉ dance,
ĉar en la mondo regas nun demokrati'.

Parolis Fandi tiom klare kaj konvinke,
ke meritul' usona eĉ singultis drinke,
kaj elmurmuris: – Homoj, mi admonas vin, ke
kapablas Dima iĝi jam la prezidant'.

Protestis Dima: – Mi la nunan ne abolas!
Bieron ŝatas mi, kaj tio min konsolas.
Mi kun Grigorij en la viv' ne karambolas,
do restu daŭre li aganta sur posten'.

Sed levis voĉon tuj Viktor', la Ĉionscia:
– Ni saltu for el nia rondo koteria,
ĉar tiun, kiu estas nur duonebria,
prezidantigi ne permesas la Statut'.

Oj, ne ridigu min, ĉar falos mi en sveno! –
tuj intervenis saĝa Guru Selesteno. –
Se mi prezidu, mi atestos ja sen peno,
ke bierumis, certe, ankaŭ Zamenhof.

Aleksandr Blinov – la ĉeforganizanto de la Lingvaj Festivaloj en Ĉeboksari

Ĉe tiom arda disputado la publiko
iom post iom venis al la gramatiko,
akuzativo, kiel lingva umbiliko,
vortordo kaj la difinita artikol'.

La prezidanto tiam blekis kun
blasfemo:
– Sinjoroj, tio ja ne estas nia temo!
Sed la publik', en fajro de la
disputemo,
nur malkontente fajfis pri la
prezidant'.

Kaj komenciĝis vera tohuvabohuo,
sakrad', pugnado kaj la plej mem-
fida bruo,
kvazaŭ ne plu ekzistis iu ajn tabuo
por samlingvanoj, incititaj en batal'.

En Ĉeboksari ekfunkciis bierejo –
por BREU-kongreso tute taŭga laborejo.
Kaj batalpreta tristis ĉe la enirejo
senkulpa Griŝa – brava prezidant'.

17.10.2011

organizantinoj de LF preparas la diplomojn

Programo de la 27-a Rusia Esperantista Kongreso

La 20-a de oktobro, ĵaŭdo

Dumtage: Alveno, enloĝigo, registrado de partoprenantoj.
15:00 – Piedpromeno kaj vizito al muzeoj: Ĉuvaŝa nacia kaj Biera.

La 21-a de oktobro, vendredo

11:00	12:00	Prezento de la eldonejo "Impeto" kaj ĝiaj libroj	Oficejo "La lingvo de sukceso" ("Язык успеха")
13:00	14:00	Tagmanĝo	
14:00	16:00	Studenta lingvistika konkurso	ĈGPU(pedagogia unversitato), (ЧГПУ, 5-й корпус)
16:00	19:00	Ekskurso tra Ĉeboksary (buse, kun ruslingva akompano)	starto de ĈGPU
19:00	21:00	Koncerto de Mikaelo Bronŝtejn	kafeterio "Finikija"

La 22-a de oktobro, sabato

9:30	12:30	REU-konferenco	Oficejo "La lingvo de sukceso" ("Язык успеха")
13:00	14:00	Tagmanĝo	
14:00	18:30	Inaŭguro de la Lingva festivalo, lingvoprezentoj	Gimnazio №5
19:00	21:00	Koncerto de Maria Koĉetkova	kafeterio "Finikija"

La 23-a de oktobro, dimanĉo

9:30	11:00	REU-konferenco	Gimnazio №5
11:00	14:30	Lingvoprezentoj	Gimnazio №5
14:30	15:30	Internacia koncerto	Gimnazio №5

EŬROPA TAGO DE LINGVOJ
EN LA USONA KULTURA CENTRO EN MOSKVO

La 9-an de oktobro, dimanĉe, en Moskvo, en la Usona Kultura Centro, situanta en la Biblioteko de fremdlingva literaturo, je la 15.00 malfermiĝis la unika aranĝo – lingva festivaleto, dediĉita al la 10-jariĝo de la Eŭropa Tago de Lingvoj. Ĝin okazigis la Moskva junulara E-klubo EK MASI, kiu jam kvin fojojn organizis la grandajn Moskvajn Lingvajn Festivalojn.

Ĝuste la 5-an festivalon vizitis la direktoro de la Usona Centro Kore Gleason kune kun la vicdirektoro Irina Ĉornenjkaja – kiel la plej simplaj gastoj. Malgraŭ ke ili venis, ricevinte la invitleteron, neniu sciis pri ilia partopreno. Kaj oni ne ekscius, sed ili, ravitaj de la Festivalo, generis ideon pri kunlaboro kaj post kelkaj monatoj invitis nin trakti okazigon de la lingva festivaleto en ilia Centro. Kaj sian inviton ili komentis per la fakto, ke en Usono loĝas tiom da popoloj, ke ajna prezentota lingvo certe troviĝos en la landaro. Tial ni rajtis kompili la programon laŭ nia oportuno. La invito venigis min al la ideo maltriviale celebri la 10-an datrevenon de la Eŭropa Tago de Lingvoj, kiu ja estis la 26-an de septembro de la kuranta jaro. Kutime nia klubo celebras ĝin per la Publika Ago en la parko "Caricino", sed jen – la nova maltriviala ŝanco. Tiel ni interkonsentis.

prezento de la hispana lingvo

Laŭ la paso de la preparlaboro pli kaj pli firmiĝis la intenco adapti enhavon de la prezentaĵoj al la speciala ejo. La unua puŝo estis la estimo de la gastigantoj al la organizantoj – kiuj ja estas esperantistoj; do, Kore diris, ke ŝi ŝatus aŭdi rakonton pri Esperanto en Usono. Sed kial nur Esperanto en tiu aspekto? Mi proponis al ĉiuj niaj lingvoprezentantoj nepre enmeti en la rakonton informojn pri tio, kiel "fartas" "ilia" lingvo en Usono, kiam kaj kiel ĝi trafis tien, kiom zorge estas gardata, ĉu diferencas de la lingvo en la origina teritorio ktp. Kaj al Kore mi petis rakonti en la enkonduka prelego pri la ĝenerala lingva situacio en Usono. Jen tiel formiĝis la programo. Rezulte ĝi aspektis jene:

Komuna parto:

– salutvortoj de la organizantoj (E-klubo EK MASI kaj Usona Centro);

– rakonto pri la Eŭropa Tago de Lingvoj (la klubano Miĥail Derbasov);

– prelego de Kore “Lingva situacio en Usono” (laŭ peto de la publiko – en la angla);

– prelego de Nikolao Gudskov “Esperanto en Usono”;

– du kantoj en Esperanto plenume de Oleg Ĉajka.

Poste sekvis tri serioj de lingvaj prezentoj, po 3 lingvoj en ĉiu:

1) Esperanto (Georgij Kokolija), la franca kaj la latva.

2) La rusa, la kartvela, la cigana.

3) La pola, la hispana kaj – daŭre – la kartvela.

Dum la tuta tempo de la prezentadoj okazis tradicia en niaj aranĝoj gustumado de elitaj ĉinaj teoj. En granda paŭzo tre vigle pasis lingva kvizo, gvidata de nia klubano Miĥail Ĥaminskij.

La aranĝo finiĝis per la Fermo – kun diplom-enmanigo kaj koncerto en diversaj lingvoj fare de speciale invititaj niaj amikoj-muzikistoj.

La etoso, varmigata de reciproka admiro inter la organizantoj, estis tre kora, malstreĉa kaj pozitiv-plena.

La Festivaleto gastigis ĉirkaŭ 160 personojn, inter kiuj estis multaj unuafojaj vizitantoj kaj de la Usona Centro, kaj de la Lingva Festivalo. Jen kion skribis al mi unu el tiuj: “Unuan fojon mi vizitis Lingvan Festivalon, kaj min simple surprizegis la amika etoso. Ĉio faritis kun tioma sindono, tioma inspiro... Fantaste! Grandan dankon al vi pro la organizado de la Eŭropa Tago de Lingvoj!”

La plej grava atingo de la aranĝo estas la novaj amikoj de la Lingvaj Festivaloj, do, novaj eventualaj organizantoj, kaj, certe, la firmiĝo de la interrilatoj kun la Usona Kultura Centro – ja evidentas, ke ni emas kunlabori pli kaj pli.

Irina Gonĉarova (Odincovo)

LA 1-A MOSKVA LINGVA FESTIVALO POR LERNEJANOJ (MLFL-1)

... sukcese pasis la 30-an de oktobro en la Pedagogia kolegio №5 en Moskvo.

Du kialoj kaŭzis ĝian aperon: foresto de konvene granda ejo por la ordinara Moskva LF kaj okulfrapa abundo de registriĝantaj por LF lernejanoj kaj lernejaj instruistoj (pli ol 90). La organizantoj – kiel ĉiam kaze de Moskvaj LF tio estis la Moskva junulara E-klubo “EK MASI” – staris antaŭ elekto: tute ne okazigi la festivalon ĉi-jare kaj plu serĉadi la ejon aŭ okazigi ties malgrandan version. La aferon solvis la registriĝo de 42 lerneja-

prezento de Esperanto

noj el Kaluga, planintaj veni pro LF en Moskvon dum la lernejaj ferioj. Trompi esperojn de tiu ĉi grupo ni ne rajtis. Do – estu la nova festivalo – speciale por lernejanoj (LFL)!

la halo dum la Solena Fermo

Post la decido mi tuj skribis al ĉiuj aliĝintaj gvidantoj de la lernejaj grupoj, por precizigi iliajn intencojn kaj esperojn lige kun LFL, kaj ĉiuj detale kaj diligente respondis miajn demandojn. Mi eksentis, ke mi parolas kun vere interesitaj homoj, ke ni eble povus esti kolegoj, kune laborantaj por evoluigo de LFL. Kaj en la programo de la festivalo aperis nova programero: "Diskutrondo: kiel disvastigi la lingvofestivalan movadon?". Anticipante la eventojn, mi diru, ke rezulto de tiu ĉi diskuto estis planado de LFL en Kaluga.

Pro manko de tempo ni ne strebis adapti tiun ĉi festivalon al la interesoj de lernejanoj (kion tutcerte ni faros, se MLFL iĝos tradicia). La situacie kaŭzita "adapto" estis nur en duoble malpli granda kvanto de programeroj kompare kun la, ekzemple, antaŭa MLF.

Do, estis prezentitaj "nur" 34 lingvoj (el kiuj 11 – dufoje, Esperanto – trifoje) kaj 10 prelegoj. La diapazono estis kutime vasta: de popularaj (kiel la japana) ĝis nekonataj (kiel la afrika jaure), de vaste disvastigitaj (kiel la hispana) ĝis formortantaj (kiel la livona), de la antikvaj (kiel la antikva rusa) ĝis la junaj (kiel la novhebrea). Ĉi-jare senkonkurence kiel planlingvo solis Esperanto.

Kiel kutime, la esencan programon kadris la Solena Malfermo kun kelkaj koncerteroj kaj la Solena Fermo, kiu laŭ si mem estas fakte la Koncerto. Ambaŭ pasis bonege. Tio signifas, ke ĉio komenciĝis kaj finiĝis perfekte laŭplane kaj ke la kvalito de la artaĵoj estis vere bonega. Speciale indas mencii la anoncaranĝadon de la ferma koncerto, organizitan kiel vojaĝo de Elli-Doroti en la Oz-Lando al la sorĉisto Gudvin. Ĝi estas unu el la meritoj de la nova MLF-teamo, pri kiu nepras diri almenaŭ kelkajn vortojn.

MLFL estis realigita de la draste renovigita teamo, kiu kreiĝis post la celebro de la Eŭropa Tago de Lingvoj en la Usona Kultura Centro, okazinta la 9-an de oktobro. La 14-an de oktobro nekonataj al mi kaj inter si volontuloj kolektiĝis en iu moskva kafejo, distribuis la "tekojn", kaj la 30-an de oktobro okazigis la priskribatan festivalon. Rave kaj brave! La gejunuloj impetegas al la sekvaj venkoj surkampe de la LF-agado. Fakte, por mi la apero de tiu ĉi nova kolektivo de kreemaj gejunuloj estas la plej grava atingo de la 1-a MLFL.

Irina Gonĉarova (Odincovo)

SUFIKSAJ E-VORTOJ MANKAJ EN LA RUSA LINGVO

parto 4 [1]

Sufikso -ISM-

Fekunda vivtereno de la arto estas tiu de la naciaj kulturoj, kie ĝi vivas inter limoj de absoluta neniondira unikeco (**iesismo**) ĝis absoluta neniondira banaleco (**ĉiesismo**). Tiel tradukarto konstruas pontojn inter naciaj kulturoj kaj samtempe la fundamenton de la malkaŝata internacia kulturo.
Aleksandr Fjodorov, or., Ukrainio, La Gazeto, 125 (jun. 1990), p. 17

Izjumenko mem proponas anstataŭigi UEAn per uea.org – utiligi la movadon funkcie al la virtualo, pli ol interreton funkcie al la movado. Alex Kadar, per sia atako kontraŭ **ĉionismo**, proponis transformi UEAn (kongrue kun la Manifesto de Prago) al NRO batalanta ne por solvi la mondan lingvoproblemon, sed por defendi la lingvajn rajtojn laŭ specifa interpreto.
Perla Martinelli, or., Italio – Svislando, Heroldo de Esperanto, 2009, 1, p. 1

Don **Kiĥotismo** kaj Sanĉo-**panĉismo**
estas titolo de artikolo en: Antonio Marco Botella, or., La Gazeto, 91 (dec. 2000), p. 26

Sentede. Kial? Pro **ekzotismoj**,
Sed reprezentoj kvazaŭ de la historio ĉe mi.
Mao Zifu, or., Ĉinio, Riveroj, 1997, 16, p. 26

Aliaj avertis kontraŭ oficialigo de samseksa vivo, denuncis inceston kaj **haremismon**! – Fine avangardistaj grupoj postulis plenan forigon de la geedziĝa stato, kiun oni simple anstataŭigu per jura kontrakto.
or., Norda Prismo, 1968, 3-4, p. 162

Se ni kredas la heroecon de iu solulo, ni faras bruon, kvazaŭ pro io neordinara; sed rezulte... Dum la milito ĉi tio malaperas per si mem, kaj ekregas plena egaleco de l' **heroismoj**.
A.Korĵenkov, el la rusa, La Ondo de Esperanto, 2001, 10, p. 15

La aŭtoroj aludas al la **klerismo** ĉe avo Fabian, sed silentas pri la dua profesio de la patro (cara cenzuristo)...
Giorgio Silfer, or., Svislando, Literatura Foiro, 201 (feb. 2003), p. 4

Grava postulo estas **konkretismo**: klara vortumo de tio, kion ni volas.
Imre Szabó, or., Hungara vivo, 1980, 6, p. 218

Fakte ajna komenco en la kolekto taŭgas por montri la solidan **metiismon** de nia granda aŭstralia verkisto.
Antonio Valan, or., La Gazeto, 93 (mar. 2001), p. 20

Ĉi tiuj noveloj ofte kaj plurnivele kontraŭpunktas, ke ĝuste la juĝistoj **moralis-**

[1] La antaŭaj partoj aperis en REGo №№ 3 (64) – 5 (66), 2011.

maj... Ĝuste en la stilo – tiu ŝatata sudeŭropa apriorilo – oni la "amatinon vestas", por inviti al nia saĝumo ankaŭ la hungaran prabardon...
Probal Daŝgupta, or., Hindio, Riveroj, 26 (nov. 1999), p. 42

Liaj opinioj estas ĝenerale **malnaciismaj** kaj racionalaj. Li ofte vipadas la "**provincialismon**" de la hungara literaturo...
Eŭgene de Zilah, or., Hungario-Francio, Literatura Foiro, 97 (dec. 2001), p. 3

Mallonge dirite, temas pri demokratio de diversecoj, kiuj diferenciĝas de maldemokratio de **purismo** (unueco de puraj sistemoj, en kiuj oni preferas nur unu nacion, unu religion, unu politikan linion...).
Zlatko Tiŝljar, or., Slovenio

Sonas eble kiel rimarko de antaŭ duonjarcento, en Nederlando, ankoraŭ estas profunde enradikiĝinta **seksismo**, ankaŭ rilate literaturon... Foje refoje mi notas, ke kiam aperas nova libro mia aŭ kiam ion alian mi eldonas, la viroj sian malkomforton apenaŭ povas kaŝi.
Paul Gubbins, el la angla, Literatura Foiro, 200 (dec. 2002), p. 313

Do mi parolos pri la vojo de Kebekurbo kaj la vojo de Meksikurbo – *nia* vojo. Ili parolas pri libera komerco; ni pri libera komunikado. Tamen la diferencoj estas pli profundaj ol ni povus supozi el tiu **simplisma** formulo.
Mark Fettes, or., Kanado, Esperanto, 2001, 6, p. 102

La fideleco ofte estas nur rezigno pri eblo ŝanĝi la kutimon, kiu estas la plej abomeninda **sklavismo**, ĉar ĝi konsumas en ni la homan dignon kaj igas nin kompromise cedi eĉ al tio, kio rezultos nian pereon.
Julio Baghy, or., Hungario, Norda Prismo, 1962, 1, p. 17

Neutilaj neologismoj kaj **solecismoj** nur poluas la lingvon, sed ne minacas ĝian estonton.
Eŭgene de Zilah, or., Hungario-Francio, La Gazeto, 99 (mar. 2002), p. 3

Sekvatage en la urbo mi haltis antaŭ librovendejo, kiu – malgraŭ okulfrapa **specialismo** pri nudulinoj – montrofenestre havis verkaĵon, sur kies kovrilo videblis muskolfortiganto...
Gerrit Berveling, el la nederlanda, Fonto, 262 (okt. 2002), p. 17

Sed la **tradukismo** de la unua periodo respondis unuavice al la bezono de nia socio: por la tiama esperanto la propagando restis prioritata.
Giorgio Silfer, or., Svislando, Literatura Foiro, 208 (apr. 2004), p. 81

En nia universo ĉiu el ĉiuj vivas sian propran vivon, sian propran daŭron, sian propran procezon, inkluzive homon kompreneble. ... Tamen la **unikismo** (kiel mi provizore nomas la ideon bazitan sur la unikeco de la vivo) ne signifas absolutigon de individuo.
Azma, or., Japanio, Sennacieca Revuo, 1991 (119), p. 26

Unuflanke ni konstatas **cinikismon** – "tio tamen ne estas mia afero", aliflanke nin

renkontas sentimentalaj rememoroj pro tio...
Jiri Karen, or., Ĉeĥio, La Gazeto, 37 (dec. 1991), p. 7

La ĝisnunaj difinoj de materio ne tre kontentigas min, ĉar en iuj svarmas spiritualismaj kaj **perceptismaj** nuancoj.
Josef Kavka, or., Ĉeĥio, La Gazeto, 96 (okt. 2001), p. 5

Mi diris pasintsomere, duone ŝerce, duone serioze ke estas senutile por UN sendi trupojn al Kongo se ĝi ne sendas samtempe ankaŭ religi-historiistojn familiarajn kun la praaj mitoj kaj primitivaj ideologioj **jarmilismaj**.
Ionel Onet, or., Rumanio-Germanio, La Gazeto, 90 (okt. 2000), p. 31

Eblas, ke ankaŭ ĉe la relative juna E-kulturo post unu jarcento da poezi-tradicia firmiĝo, estas ĝuste nun atingita tiu punkto, kie la avangarda **eksperimentismo** ekvivis kaj prospere arigas adeptojn kaj entuziasmajn verkistojn.
Nicolino Rossi, or., Italio, La Gazeto, 104 (jan. 2003), p. 26

... ekzistas poeziaj licencoj en la lingvaĵo de niaj poetoj; ekzistas **solecismoj**, **abderismoj** kaj kelkaj juĝodeflankiĝoj...
Eŭgene de Zilah, or., Hungario-Francio, La Gazeto, 103 (dec. 2002), p. 4

La poeto estas eta dio, asertas la ĉiliano Vicente Huidoro, iniciatinto, kune kun la franco Pierre Reverdy, de la avangarda movado nomata **Kreadismo**, kiun Huidoro mem enkondukis en Hispanion en 1918. Dense **konceptismaj** formuladoj, apudeco de vortoj ordinare ne apudigeblaj...
Miguel Fernandes, or., Hispanio, Fonto, 265 (nov. 1998), p. 25

El la versoj de Mao Zifu elfluas tia viv-kuraĝo, tia digno, tia anima grandeco, ke li, samkiel la heroo de la hispana populara poemo "El Piyajo"... nome ĉe mi naskas imponan respekton. Nenia **viktimismo**. Lia situacio, kompreneble forte speguliĝas en lia verkaro.
Miguel Fernandez, or., Hispanio, Fonto, 215 (nov. 1998), p. 24 [Mao Zifu estas viktimo de trafikakcidento, invalido. – rim. de A.G.]

Male, oni deziras gloron, kaj en la scienco aperos ĉarlataneco, strebo al efektoj, kaj precipe **utilismo**, ĉar oni deziros ankaŭ la riĉecon.
A.Korĵenkov, el la rusa, La Ondo de Esperanto, 2001, 10, p. 15

Jes, poezio. Iom **elitisma** kaj por elituloj. Majstra tekniko en divesaj formoj – de soneto...
V.Melnikov, or., Rusio, La Ondo de Esperanto, 2001, 10, p. 16

Al la sama direkto apartenas la ofta atributo "komunisma" (sen difini pri kio temas). Ĝi estas por Zms **sloganisma** klabo, kiu anstataŭu argumenton kaj i.a. havas la funkcion supozigi...
Detlev Blanke, or., Germanio, La Ondo de Esperanto, 1999, 4, p. 8

... tro ofte oni miskomprenas la virinajn verkojn kiel konfesaj kaj personaj. Virinoj ĉe la nepala PEN-centro foje diris, ke ĉio, pri kio ili verkis, estis supozita vero, kaj

la socio punis ilin kvazaŭ ili estus murdistoj, malĉastulinoj ks. Tio estas pura **seksismo** kaj tre ofende.
Sabina Stelberg, el la angla, Literatura Foiro, 201 (feb. 2003), p. 8

Estas koloro de ŝtono, senmakula, glimanta, brilanta, nerimarkeble ŝanĝanta sian tonon, kolore homogena aŭ **punktilisma** miksaĵo de variaj makuletoj. Estas teksturo de ŝtono, ĝia vitreco, grajneco, karneco, moleco, dureco, porozeco, kompakteco...
Radoslaw Nowakowski, or., Pollando, Literatura Foiro, 190 (apr. 2001), p. 99

En la agado de esperantistaj societoj la **ekspresivisma** sinteno manifestiĝas kiel **malseriozismo**, enfermita sektismo, vanta tempopasigo, kiu malemas ĉiun spiritan aktivecon...
Osmo Buller, or., Finnlando, Literatura Foiro, 91 (jun. 1985), p. 15

... signifas samtempe distanciĝi de tiu miskomprenita kosmopolitismo (MK), kiu foje blindigas la homojn, ankaŭ se esperantistojn: Nome de MK multaj **ajnisme** suspiras ke la interetnaj militoj estas forbalaenda restaĵo de la Mezepoko.
Daniele Vitali, Literatura Foiro, 190 (apr. 2001), p. 91

En prelego pri la Ibera Skolo, komence de julio 2000 en Tuluzo, Miguel Gutierrez emfazis la **amikismon** tie regan, sinteno kiu tuj vidas ĉe ajna kritiko nur minacojn kaj ponardon, kaj kiu igas la anojn blindaj.
Reinhard Haupental, or., Germanio, Literatura Foiro, 190 (apr. 2001), p. 110

Abram grumblis al sia amiko: "Ĉiam, kiam mi alvenas hejmen kun nova knabino, ŝi ne plaĉas al mia patrino. Panjo tuj komencas diri pri ŝi malbonaĵojn. Mi ne sukcesas trafi ŝian guston."

La amiko konsilis al li: "Trovu knabinon, similan al via patrino. Tiam ŝi ne kritikos."

Post 3 monatoj ili denove renkontiĝis.

"Mi agis laŭ via konsilo", diris Abram. "Mi trovis knabinon, similan al mia patrino. Ŝi same aspektas, same parolas kaj havas la saman karakteron."

– Nu, vidu... kaj kio?

– Mia patro ne toleras ŝin!

juda humuraĵo de Josef Shemer

Sed ankaŭ en aliaj tradiciaj okcidentaj demokratioj ni vidas tendencon al tia **miismo**. Memoru la duelon inter...
Stefan Maul, or., Germanio, Monato, 2001, 8, p. 5

En Benino la poŝtelefono... fariĝis signo de socia bonfarto, ... kaj en publikaj lokoj longe melodias telefonoj, ĝis la telefonatoj finfine aŭdigas "Ha lo" kaj ĉiuj vizaĝoj estas direktitaj al li... Tiu ĉi "**ĉu-vi-vidas-min-ismo**" obsedas beninanojn.
Christian Fabossou, or., Benino, Monato, 2001, 12, p. 12

La volumo kiel tuto restas sur la nivelo de **anekdotismo**: malgraŭ la mikso de interna tempoordo la rakontetoj estas unudirektaj, rekte kompreneblaj vivobildoj...

Lariko Golden, or., Hungario, Esperanto, 2003, 1, p. 14

Do, se ĉio plejbonas en la plej bona mondo, ŝajnas tute senbaza tiu fenomeno de *idea **rezignismo***, kiu atakas partojn de la malnova movado.
Renato Corsetti, or., Italio, Esperanto, 2002, 1, p. 6

Nin modernulojn hantas **rubrikismo**. Por kompreni ion, por senti sin sekuraj pri ĝi, ni devas klasi ĝin. Sed mia Esperanto rezistas klasiĝi.
Mark Fettes, or., Kanado, Esperanto, 2000, 12, p. 201

... kaj oni devas kompreneble per ĉiuj niaj fortoj antaŭenpuŝi la aferojn, sed oni ne postulu tro, oni ne estu **volisma**... ĉar ties rezultoj estas plej ofte malespero kaj forlaso de la movado.
Kolomano Kalocsay, or., Hungario, Esperanto, 1998, 5, p. 86

Cetere en najbara fjordo sur barita duoninsulo sin paŝtas pli ol 3000 boacoj sub varto de norvega lapono kun eskimaj helpantoj. Bela **interskandinavismo** en praktiko.
Poul Thorsen, or.

Per la vorto **zamenhofismo** ni indikas la filozofian idearon (ideologio estus eble troigo) de L.L.Zamenhof, inkluzive de tio kion li nomis hilelismo/homaranismo. Zamenhofismo evoluas tra la jardekoj sed restas fidela al du fundamentoj: neŭtrale homaj lingvo kaj religio.
Giorgio Silfer, or., Svislando, Heroldo de Esperanto, 2002, 16

La respondo de Neil Kinnock, responso pri lingvodiverseco en EK, al David Curtis (Britio) estas plia nokaŭto por ĉiu kiu celas **unulingvismon**, ĉu hegemonie por la angla ĉu neŭtrale por esperanto.
or., Heroldo de Esperanto, 2002, 16, p. 1

Se la risko de troa senleĝeco estas ĥaosa anarkio, male, la risko de troa **jurismo** leĝa kaj truda estas interveno de ĉiam pli potencaj ŝtatoj kaj policistoj, laŭ la peza ekssoveta modelo...
F.Degoul, or., Heroldo de Esperanto, 2001, 8, p. 4

La estraro de GDREA sufiĉe suverene ne tro toleris la **simplisman** nivelon kaj agitmanieron de IKEK kune kun sia revuo *Internaciisto*, kiu siatempe estis eĉ pli **sloganisma** kaj teda ol la ĉiutagaj partiaj legaĵoj.
Detlev Blanke, or., Germanio, Heroldo de Esperanto, 1999, 3, p. 2

Ĉiutage kiam mi komencas manipuli vortprocesilon, miaj fingroj aŭtomate diboĉas tajpi sur ekrano bagatelan ideon... Tiel ĉi komenco ĉiufoje ordonas la fingrojn "Fidele observu..." Sed efektive ĉiam mia indiko ne efikas, kvazaŭ ĉe la pinto de l' fingroj... Estas interese, ke per la iniciativo de l' **oponismaj** fingroj estiĝas iel leginda verketo, kies enhavo ege plaĉas al mi strange.
Mitusi Kiyosi, or., Japanio, Riveroj, 1995, 10, p. 10

Dum la jaroj de komunismo eldonejoj iom ignoris tiel nomatan sciencopopu-

larigon. ... Estas tute strange, ke dum komunismo tio povis okazi. Tio tute kontraŭas ties **edukismon**, tute kontraŭas komunisman principon.
Riveroj, 1995, 8, p. 1

Unu sekvo de la punktoj 3 kaj 4 ekzemple estas la malfacilaĵoj pri akuzativo kaj pri **nacilingvismoj**, kiujn speciale memlernantoj ofte frontas.
Wolfram Diestel, or., Internacia Pedagogia Revuo, 1998, 2, p. 28

Kaj ĉu ne estas, ĉiaokaze, terura **aĝismo** malvoli al niaj glavoj ilon [Esperanto – rim. de A.G.] per kiu post tutviva laboro, ili povos plivalorigi kaj plifeliĉigi siajn aŭtunajn jarojn.
Majk Sadler, or., Eventoj, 1995, 1/nov., p. 2

Sopitalismo laŭnome socialismo, sed efektive pli kapitalisma ol vere en modernaj kapitalismaj landoj. [Temas pri Ĉinio – rim. de A.G.]
La Espero en Koreio, 1993, 4, p. 15

Sed estas pli grave: fakte la verkinto de la artikolo ŝajne deziregas trudi al ni siajn politikajn **simplismojn**, laŭ kiuj Hitler kaj Stalin estas samaj aferoj.
J.P.Orliange, or., Sennaciulo, 1999, 6, p. 70

Lia kapo pensigis min pri desegnaĵo en karikaturo. Ĝi estis tro granda por lia korpo, kaj liaj okuloj estis maksimume **strabismaj** – diverĝaj.
Trevor Steele, or., Aŭstralio, Neniu ajn papilio, Vieno: IEM, 2000, p. 200

Aliaj hinduoj diris al mi, ke neniu hinduo volas loĝi en la sama kvartalo kun islamanoj, do fakte estas malamika "**komunumismo**".
Trevor Steele, or., Aŭstralio, La Gazeto, 114 (okt. 2004), p. 17

Puŝkin esplore priskribis la historian veron kaj esprimis, laŭ realeca, simpla kaj tuja stilo, sentojn, vivmanierojn kaj aspirojn de historiaj figuroj de la pasinteco, kaj per sia rakonta **verismo** li postlasis al ni plurajn perlojn de la novelarto.
Nicolino Rossi, or., Italio

Sendependismo. Samtempe ekdisvastiĝis en Katalunio opoziciaj simboloj. Kato estas elektita de grupo, sin nomanta Kontraŭkolonia Ligo, ĉar...
Hektor Alos i Font, or., Hispanio, Monato, 2005, 3, p. 11

Post neniam ekzistinta socialismo ni pasos en epokon **sen-isman**, kun antagonismoj ne ideologiaj (ideologioj ankaŭ ĝis nun servis por kaŝi la beste elstomakajn pluviv-instinktojn) sed ekonomiaj...
Istvan Ertl, or., Hungario-Nederlando, La Gazeto, 97 (dec. 2001), p. 16

Sen tio, ni nur flosas inter defendantoj de naciaj **apartismoj**, batalantoj kontraŭ tutmondigo, politikaj radikaluloj, kaj aliaj porokazaj aliancanoj.
Istvan Ertl, Hungario, La Ondo de Esperanto, 2004, 4, p. 4

Lastatempe ekfloris diskuto pri **seksismo** en la esperantistaj rondoj. ... kial du seriozaj gazetoj (Esperanto kaj La Ondo) samtempe ornamis siajn kovrilojn per

anonimaj virinoj, eble por allogi per beleco kaj aludita nudeco.
Sten Johansson, or, Svedio, La Ondo de Esperanto, 2004, 4, p. 18

"Permesu al mi diri ke la **multlingvismo** inkluzivas tiajn lingvojn, kiuj ne estas oficialaj, sed certe ne Esperanton, ĉar ni havas sufiĉe da vivantaj lingvoj, kiuj spertas malfacilaĵojn..." – diris Viviane Reding... [Kial ne uzi la terminon "multlingveco"? – rim. de A.G.]
La Ondo de Esperanto, 2004, 3, p. 13

La Eŭropa civilizacio pereos pro **kompatismo**. Meĥanismo de la pereo... montriĝos kiel paralizo kontraŭ ajna malico, ajna fieco, ajna malicfaro: do finfine maliculoj disŝiros la mondon. (Vasilij Rozanov, 1913).
Alexander Gofen, or., Rusio-Usono, La Ondo de Esperanto, 2004, 5, p. 15

... tio estas serĉi rifuĝon en aliaj religioj kaj superstiĉoj, aŭ kredi ke la orientaj filozofioj solvos la problemojn naskitajn de la soleco, bagateleco, vakuo de l' vivo en la kapitalista socio, sub la regno de l' **maŝinismo** de la moderna mondo.
Ĵak Le Puil, or., Francio, La Kancerkliniko, 79 (jul.-sep. 1996), p. 4

Spite al sukcesaj prezentoj en operejoj kaj teatroj, ĉu vere temas pri ĉefverko Breĥta? Tedas ja la multaj personoj, kaj troas ripetoj de negravaj detaloj pri ricelbutikoj kaj **bandismo** en la epoko de reĝino Viktorija.
Poul Thorsen, or., La Kancerkliniko, 71 (jul.-sep. 1994), p. 7

Kvankam estas nenio malbona en tia agnosko, la insisto de LF pri ĝi forte odoras je la **desuprismo** kaj **instituciismo**, kiujn ili tradicie kritikadas.
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, La Kancerkliniko, 71 (jul.-sep. 1994), p. 25

Resume, nia kara Giorgio ne povos digesti, ke nuntempe, aparte de geniaj figuroj kiel la aŭstraliano Trevor Steele, la du nuntempaj fokusoj de ne-unuopa verkado en esperanto troviĝas en Britujo (novparnasistoj: Tim Carr kaj Krys Ungar) kaj Iberujo, kaj ke, se li daŭrigos sian megalomanian kaj **umbilikisman** karieron, li restos en historio de nia beletro kiel verkema kurioza mediokrulo...
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, La Kancerkliniko, 71 (jul.-sep. 1994), p. 26

Konklude (kaj vortlude) mi diru, ke plejparte mi opinias raŭmismon **ŝaŭmismo**. Kaj mi preferas ne mergi min en tian ŝaŭmon, sub kies supraĵo mi klare divenas mucidon kaj ŝimon.
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, La Kancerkliniko, 71 (jul.-sep. 1994), p. 27

Mi mem preferas koncepti esperantecon tiel, ke mi aliĝas al la projekto, lingvo kaj ideo de Lazaro Ludoviko Zamenhof (parte aŭ tute aŭ diversgrade, laŭ mia bontrovo), same kiel mi povas aliĝi (aktive aŭ pasive) al la agado de Greenpeace, Amnestio Internacia, Internacia Penklubo aŭ Mensa kaj ne pro tio mi aŭtomate iĝus ano de diasporo. Krome, la koncepto diasporo mem implicas strebon al kuniĝo, al rekuniĝo. Jen kial mi opinias ĝin funde **finvenkisma**, **jarmilisma**, **mesiisma**. Uzante kaj reuzante ĝin mi plene pravigas tiujn, kiuj rigardas nin sekto.
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, La Kancerkliniko, 71 (jul.-sep. 1994), p. 27

Ili estas semantoj de la lumo, de la perturbo... provantaj detrui la pacan malfekundecon de la etburĝa **kvietismo**.
Manuel de Seabra, or., Portugalio, La Kancerkliniko, 75 (jul.-sep. 1995), p. 6

Je iu ajn prezo, spektaklon volas la popolo. Futbalo, taŭrbatalo... bokso, **biciklismo**, **atletismo**, handbalo, ĵudo...
Ĵak Le Puil, or., Francio, La Kancerkliniko, 87 (jul.-sep.) 1998, p. 4

La ĵo estas la norma itala lingvo, sed kun oftaj rektaj paroloj en la roma dialekto; la temoj apartenas al la gusto de **verisma** tradicio, kun iom da humuro...
Carlo Minnaja, or., Italio, Literatura Foiro, 140 (dec. 1992), p. 299

Tio estas la danĝera kontraŭflanko al la **emociisma** sinteno de Zamenhof kaj de siaj "intern-ide-anoj" kiuj emas vidi precipe nur la mond-savajn ecojn de la lingvo internacia.
Renato Corsetti – Maŭro La Torre, or., Italio, Hungara Vivo, 1982, 5, p. 175

La strategio de la dekstrularo estas: interpacigi la maldekstran opozicion kaj tiel malfortigi ĝin. Fantomumas en Eŭropo, kaj tiun fantomon ni devas kontraŭbatali. **Ĥaosismaj** sektuloj ne havas lokon en nia movado...
or. LEA/G Magazino, 2002, 2, p. 11

La poetoj (kun kelkaj esceptoj, kiel la elstara Luzi) ekemis rigardi neglekte la leksikan materialon kaj degeneris surogati versojn per plata, prozaĉa lingvaĵo. Metaforo, elvokivo kaj sugestio devis cedi antaŭ priskriba, reportera stilo, kiu fine konsekris la **ŝtuparismon**.
Goncalo Neves, or., Portugalio, Literatura Foiro, 138 (aŭg. 1992), p. 193

elnotis Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

LA LASTA ALJUĜO DE THORSEN-APOGO

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen dividis sian restantan bonhavon 1155 eŭroj inter sep ricevantoj. Per tio la 15-a aljuĝo de subvencioj el la donaco de gesroj Thorsen fariĝis la lasta. La konata dana esperantista paro donacis la bazan bonhavon de la Biblioteka Apogo al UEA en la jaro 1997 kaj samjare okazis ankaŭ la unua disdono. Origine oni antaŭvidis, ke la donacita mono sufiĉus por deko da jaroj, sed la gajnita rento plilongigis la vivodaŭron de tiu speciala kaso de UEA.

Per la decido de Claude Nourmont, estrarano pri kulturo kaj Vicprezidanto de UEA, kaj Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA, subvencion en formo de Esperanto-libroj ricevis Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (250 eŭroj), Asocio de Beninaj Esperantistoj (250 eŭroj), Reza Kheir-Khah (Tajvano, Ĉinio; 200 eŭroj), Marc Vanden Bempt (Belgio; 155 eŭroj), Biblioteko de la Esperanto-Muzeo en Svitavy (Ĉeĥio; 155 eŭroj), Triesta Esperanto-Asocio (Italio; 100 eŭroj) kaj Kroata Esperanto-Ligo (55 eŭroj).

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006) eblas konatiĝi per la retejo <http://www.poulthorsen.dk>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

DU ESPERANTO-KURSOJ

impresoj de ne nur observanto, sed aktiva partoprenanto

Somere E-vivo en Jekaterinburg kutime kaj nature magriĝas. Tiel okazis ankaŭ ĉi-somere: multaj E-amikoj kaj samklubanoj vojaĝis por partopreni diversajn E-eventojn: iu – Tutamerikan E-Kongreson kaj nacian E-kongreson en Brazilo, iu – SES-on en Slovakio, iuj – IJK-on en Kievo ktp. Ni, mi kaj Viktor, ĉi-somere okupiĝis pri privataj vivproblemoj, bedaŭrinde ne ignoreblaj, tial restis hejme.

Sed aŭtune nia E-vivo ĉi tie denove ekbolis. Fakte tio komenciĝis jam fine de la aŭgusto, kiam en Jekaterinburg gastis dum kelkaj tagoj esperantisto el Aŭstralio – tre simpatia junulo Riĉard – kaj tiam niaj klubanoj kunvenis en Domo de Paco kaj Amikeco por renkontiĝi kun li. Jam tiam ni komencis pensi pri du eventualaj aŭtunaj E-kursoj: la vica elementa kurso por komencantoj kaj daŭriga kurso por la progresantoj. Fine de la septembro okazis tradicia klubkunveno de "Arĝenta Flamo", dum kiu la klubanoj rakontis pri someraj E-aranĝoj, kiun ili sukcesis partopreni. Ĉi-foje ni invitis al la renkontiĝo ankaŭ neesperantistojn, sed nur tiujn, kiuj interesiĝis pri la lingvo. Tiel anstataŭ kutima prezentado de Esperanto oni povis partopreni tiun nian E-kunvenon kaj aŭskulti la rakontojn pri interesaj vojaĝoj per Esperanto kaj pri interesaj E-eventoj. Poste kelkaj partoprenintoj de tiu kunveno venis lerni Esperanton en la baza E-kurso.

Oktobre, kiam estis kompletigitaj ambaŭ kursoj, komenciĝis la lecionoj: dufoje semajne ili estis por komencantoj kaj unufoje semajne – por la daŭrigantoj. Ambaŭ kursoj okazis ĉe la urba Domo de Paco kaj Amikeco, ilin gvidis Aleksandr Osincev. Mi povas diri, ke Saŝa brile tion faris! Mi mem subtene ĉeestis ĉiujn lecionojn: unue – organizante la tablon por 10-15-minuta teumado dum ĉiu nia kunveno; due – ankaŭ mi volonte partoprenis ĉiujn dumlecionajn taskojn, lernigajn ludojn k.t.p. kaj ricevis grandan plezuron de ĉio ĉi. Estis vere ne enuigaj, sed gajaj kaj viglaj lecionoj! Krom gramatika ekzercado, dialogoj, evoluigantaj parolkapablojn, preskaŭ en ĉiuj lecionoj okazis iuj lernigaj ludoj;

ofte Aleksandr uzis diversajn aŭdmaterialojn. Mi opinias, ke ĝuste tiu ŝanĝo de formoj de la lernado helpis efike influi diversajn eblojn de hompercepto kiel aŭdkapablo, vidkapablo, memorkapablo k.t.p. kaj samtempe helpis fari la lecionojn ne tiom lacigaj (kio ankaŭ gravis, ja la homoj kunvenis vespere, ĉiam post longa labor- aŭ studtago). Krom mi, ambaŭ kursojn vizitis ankaŭ aliaj membroj de nia E-klubo. Tion mi ankaŭ konsideras grava kaj bona subteno de la afero: dum nia 15-minuta kunteumado ni povis rakonti al la novuloj pri io interesa kaj pozitiva, ligita kun Esperanto. Ĉio tio ebligis nian interproksimiĝon kun la novuloj, helpis iom post iom engaĝi ilin en nian komunan E-vivon.

Plaĉis al mi ankaŭ tio, ke fine de la kurso ne okazis tradicia ekzameno kun nepraj demandoj pri gramatiko kaj traduko de iuj tekstoj. Anstataŭ ĝi Saŝa proponis al la novuloj prepari proprajn projektojn de praktika aplikado de Esperanto kaj prezenti ilin antaŭ ĉiuj. Estis vere interese ĉeesti tiujn prezentadojn, aŭskulti foje pri tute realigeblaj aferoj kaj foje pri iuj eĉ fantastecaj projektoj. Ĉiuj komencantoj, kiuj atingis tiun neordinaran finon de la kurso, ricevis atestojn. Tiun memorindan momenton ni poste kunfestis per ĉampano kaj kune fotiĝis por la memoro.

Tuj post fino de la kurso la novuloj estis invititaj partopreni prezentadon de filmo pri Esperanto, okazontan proksimdimanĉe en la urba biblioteko, poezian E-vesperon, kiun planis fari kursanoj de la daŭriga kurso sekvontsemajne, kaj fine – tradician en la klubo Zamenhof-tagon aŭ Tagon de la E-libro, la 17-an de decembro. Do, ni daŭrigas engaĝi la komencantojn en E-vivon de nia E-klubo, penante altiri ilin al baldaŭ okazontaj E-aranĝoj. Mi kredas, ke tio ebligos ne perdi niajn kursanojn estonte kaj se ne ĉiuj el ili, do almenaŭ kelkaj daŭrigos lernadon de la lingvo en pli altnivela kurso kaj iĝos aktivaj membroj de nia E-klubo.

Kelkajn vortojn ankaŭ pri la kurso por la progresantoj, kiu okazis paralele, ĉiaŭtune, kaj nun daŭras. Ĝiaj lecionoj ankaŭ pasis varie kaj interese. Parton de ĉiu leciono okupis iu gramatika demando, postulanta pli profundan kaj harfendan lernadon, ekzemple “Uzado de akuzativo en Esperanto” aŭ “Korekta uzado de E-prepozicioj” k.t.p. Ankoraŭ unu parto de la lecionoj estis dediĉita al pridiskuto de ĉapitroj de la lernolibro “Gerda malaperis” de Claude Piron, kiun la kursanoj legis hejme. Kaj la plej interesa, laŭ mi, tria parto estis jena: ekde la komenco Aleksandr

proponis al la progresantoj elekti iun liberan temon kaj prepari ĝian prezentadon por 15 minutoj. Jam sukcese okazis tri tiaj prezentadoj: “Pri fotado, fotiloj kaj fotoarto” far Katja Zamislova; “Prezentado de la Esperanto-kanto “Mia Vojo”” far Aleksandra Osipova kaj “Esperanto-rebuso kaj E-krucvortenigmo” verkitaj de Sergeo Lokis. La sekvan prezentadon jam preparas Jana Ĥusanova. Ĉi-lasta formo de la lernado ne nur estas efika por evoluigo de E-parolkapablo, sed ankaŭ progresigas oratorajn kapablojn. Enkadre de la daŭriga kurso nun estas preparata E-poezia vespero, dediĉita al poezio de la fama E-poeto Julio Baghy. Ĉiu kursano elektis por si iun verkon de la poeto, por ne simple deklami dum la vespero, sed ankaŭ iel arte prezenti.

La progresantoj certe aktivos dum la tradicia ĉiujara festo en la klubo: Zamenhof-tago, aŭ Tago de la E-Libro, kiun ĉiam partoprenas ne nur jekaterinburgaj esperantistoj, sed ankaŭ E-amikoj el najbaraj uralaj urboj. Por la festo ili jam preparas kune kun la komencantoj specialan almanakon kun siaj unuaj provverkoj kaj sinprezentoj. Sed pri tiu estonta festo ni, espereble, rakontos al la legantoj de REGo jam en la sekva numero.

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

UEA EN UN-FORUMO PRI MINORITATAJ VIRINOJ

La 29-an kaj 30-an de novembro okazis ĉe UN en Ĝenevo la kvara sesio de la Forumo pri Minoritatoj. Ĝia temo estis *Efektiva partopreno de minoritataj virinoj en ekonomio, socio kaj kulturo*. En la kunsido ĉeestis s-ino Navi Pillay, la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj. Stefano Keller kaj Cesco Reale estis la reprezentantoj de UEA. Stefano Keller, estrarano de UEA, intervenis en la dua tago. Li atentigis pri la neceso respekti lingvajn rajtojn kaj diversecon, konforme al la “Deklaracio pri la rajtoj de personoj apartenantaj al minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj”, aprobita de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1992. Laŭ Keller UEA defendas minoritatajn lingvojn jam pli ol 100 jarojn. Dum la paŭzoj la reprezentantoj de UEA povis renovigi kelkajn malnovajn kontaktojn kun reprezentantoj de aliaj organizaĵoj kaj krei kelkajn novajn.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Bulteno de REU

KAMPANJO 125

En 2012 Esperanto-mondo celebros la 125-jariĝon ekde la apero de la Unua Libro. Lige kun tio Universala Esperanto-Asocio lanĉis la projekton "Kampanjo 125", kadre de kiu oni okazigos kelkajn aranĝojn tra la mondo. La unua estas vasta informkampanjo – oni dissendos gazetarkomunikon al pluraj amaskomunikiloj cele informi gazetaron pri la jubileo kaj altiri pli da atento al Esperanto. La dua estas organizado en 2012 en komunaj datoj tra multaj landoj de serio da diversspecaj kursoj de Esperanto. La kursoformo estos plejparte sed ne ekskluzive reta.

Krome venis propono de la itala esperantisto Massimo Ripani, kiu (la propono) estas pure reputacia, sed same grava: esperantistoj tra la tuta mondo sendu retmesaĝojn al Google kun la peto omaĝi la 26-an de julio per kreo de Esperanta logotipo ce la gugla ĉefpaĝo (kiel jam okazis pri la 150-jariĝo de Zamenhof la 15-an de decembro 2009). Ciuj dezirantoj povas sendi mallongan anglalingvan mesaĝon kun tia peto al <proposals@google.com>.

REU klopodos aktive partopreni la "Kampanjon 125".

Grigorij Arosev (Moskvo)

DISTRIBUO DE TASKOJ KAJ FUNKCIOJ EN REU

La Estraro jene distribuis inter si la taskojn:

Grigorij **Arosev** (Moskvo), Prezidanto – <arosev@gmail.com> – ĝenerala kunordigo, registrado de membroj, informa agado;

Irina **Gonĉarova** (Moskvo) – Lingvaj festivaloj;

Jurij **Karcev** (Uljanovsk) – informa agado, ekspedado, libroserva agado;

Arina **Osipova** (Jekaterinburg) – regiona agado, kontaktoj kun kluboj;

Svetlana **Smetanina** (Moskvo) – instrua agado.

Grigorij Arosev

Komisiitoj:

Viktor **Aroloviĉ** (Moskvo) – Komisiito pri dokumentado;

Miĥail **Ĉertilov** (Niĵnij-Novgoroda reg.) – Komisiito pri interreta agado;

Valentin **Seguru** (Moskva reg.) – Komisiito pri eternigo de la memoro de L.L.Zamenhof en Moskvo.

Georgij **Kokolija** (Moskvo), elektita kiel Komisiito pri la retlistoj de REU, en decembro anoncis pri sia demisio; administrado de la retlistoj estis transdonita al Grigorij Arosev.

Nikolaj **Gudskov** (Moskvo) estas Komitatano A de UEA por Rusio.
Svetlana **Smetanina** estas Ĉefdelegito de UEA por Rusio.

PROTOKOLO DE LA 26-a KONFERENCO DE REU

LA 1-A KUNVENO – LA 22-AN DE OKTOBRO 2011

La Prezidanto Grigorij Arosev (GA) malfermas la kunvenon kaj anoncas, ke la Konferencon ĉeestas 13 aktualaj membroj de REU. Poste venas 2 pliaj membroj, sekve la kvorumo por akceptado de decidoj dum voĉdonoj estas 8 voĉoj.
La kalkulan komisionon eniras Mikaelo Bronŝtejn (MB), Mikaelo Ĉertilov (MĈ) kaj Georgij Kokolija (GK). Ĉiuj voĉdonas "por" tiu konsisto. Gvidanto kaj Protokolanto de la Konferenco estu GA. Ĉiuj voĉdonas "por".
Estas proponita kaj akceptita la Tagordo: 1. Raportoj de la Estraro, Kontrol-revizia Komisiono (KRK), Komisiitoj; 2. Diskutado kaj voĉdonado pri amendoj al la Ĝenerala Regularo kaj la Regularo pri la fonduso de REU "Dumvivaj Membroj"; 3. Diskutado pri la fonduso "La Dua Jarcento de Esperanto" kaj eventuala likvido de ĝi; 4. Elektado de la Prezidanto, la Estraro, KRK, Komisiitoj; 5. Ceteraj diskutindaj punktoj.

1. Raportoj

GA nome de la Estraro raportas pri la farita laboro (vd. Suplementon 1) kaj respondas demandojn de ĉeestantoj.
GA proponas voĉdone akcepti la raporton kaj taksi la laboron de la Estraro kontentiga. Venas alternativa propono: taksi la laboron de la Estraro nekontentiga. Por "kontentiga" estas 10 voĉoj, por "nekontentiga" estas 2 voĉoj, krome estas 2 sindetenoj. Sekve *la laboro de la Estraro estas taksita kiel kontentiga*.
GA voĉlegas raporton de la prezidanto de KRK Oleg Ciganov (OC; vd. Suplementon 2). Krome estas anoncita propono, veninta de OC: por faktaj financaj aferoj de REU aranĝi librotenadon pere de faka programo "1C" aŭ simila. OC pretas okupiĝi pri tio. *La raporto de KRK estas akceptita*, ĉiuj voĉdonas "por".

Raportoj de la Komisiitoj: GA anoncas, ke du Komisiitoj (Valerij Sipoviĉ kaj Roman Bolŝakov) dum la finiĝinta mandatperiodo faris nenion, sekve ili ankaŭ ne sendis raportojn. GK, la Komisiito de REU pri la retlistoj, raportas pri la ĝenerala stato de la dissendolistoj "reu-agado" kaj "esperanto-rus-informoj". GA krome diras, ke raporto de la Komisiito pri dokumentado Viktor Aroloviĉ (VA) estas la kompilitaj de li komisie de la Prezidanto proponoj pri amendoj, diskutotaj tuj poste.

2. Amendoj (vd. Suplementon 3)

La 1-an amendon oni ne akceptas (6 "por", 6 "kontraŭ", 3 sindetenoj).
Dum diskutado de la 2-a amendo aperas alternativa propono: *esplori la situacion*

pli atente, atenti ĉiujn koncernajn leĝojn kaj poste submeti la amendon al komuna diskutado. Rezulte la 2-an amendon oni ne akceptas (3 “por” akcepto de la amendo, 1 sindeteno, 11 “por” la alternativa propono).
La 3-a amendo estas akceptita (9 “por”, 2 “kontraŭ”, 4 sindetenoj).
La 4-a amendo estas akceptita (9 “por”, 2 “kontraŭ”, 3 sindetenoj).
La 5-a amendo estas akceptita (10 “por”, 1 “kontraŭ”, 3 sindetenoj).

3. Likvido de la fonduso “La Dua Jarcento de Esperanto”

GA klarigas, ke origine la fonduso estis kreita por gajni monon por REU, sed rezulte de la ne tre sukcesa investado antaŭ longa tempo la sumo konsiderinde malgrandiĝis kaj nun estas nur 4751 rubloj, kio estas malfacile uzebla komerccele. La propono estas likvidi la fonduson kaj meti la sumon en la ĝeneralan kason.
Venas alternativa propono: ne likvidi la fonduson.
Rezulto de la voĉdonado: 8 “por” likvido, 4 “por” nelikvido, 3 sindetenoj. Sekve *la fonduso “La Dua Jarcento de Esperanto” estas likvidita kaj la tuta mono iras en la ĝeneralan kason de REU*.

4. Elektoj

4a. Prezidanto

GA anoncas sian pretecon rekandidatiĝi por la posteno de Prezidanto.
MB anoncas, ke Anna Butkeviĉ proponas por la posteno de Prezidanto Mikaelon Ĉertilov. MĈ tuj rifuzas. GK proponas ke Svetlana Smetanina (SS) formale kandidatiĝu. SS tuj rifuzas.
MĈ proponas ne okazigi la elekton de la Prezidanto sed daŭrigi la mandaton de la nuna Prezidanto.
Jurij Karcev (JK) anoncas sian pretecon formale kandidatiĝi por ke la elekto estu alternativa.
Okazas voĉdonado: 4 voĉoj estas por ne elekti la Prezidanton sed daŭrigi mandaton de la nuna Prezidanto, 10 voĉoj estas por elekti la Prezidanton, ĉar aperis la alternativa kandidato.
Okazas sekreta voĉdonado. La kalkula komisiono kolektas balotilojn, analizas ilin kaj anoncas, ke estis disdonitaj 15 balotiloj, estis ricevitaj 15 balotiloj, inter kiuj 3 estis malplenaj (sekve nevalidaj), kaj la restintaj 12 balotiloj indikas voĉdonon por GA. Sekve *Grigorij Arosev estas reelektita por la posteno de Prezidanto*.

4b. Estraro

GA anoncas proponatan konsiston de la Estraro, kiun eniros krom li mem (alfabetorde): *Irina Gonĉarova* (IG), *Jurij Karcev*, *Arina Osipova* (AO), *Svetlana Smetanina*. JK kaj SS ĉeestas kaj konfirmas sian pretecon. GA anoncas, ke IG kaj AO pli frue konfirmis sian deziron esti estraranoj. Okazas voĉdonado: 11 "por", 0 "kontraŭ", 4 sindetenoj. Sekve *la Estraro estas elektita ĉi-konsiste*.

4c. KRK

GA anoncas pretecon de la nuna konsisto de KRK (*Oleg Ciganov*, *Gennadij Basov*, *Ljudmila Novikova*) daŭrigi la laboron. Okazas voĉdonado: 13 "por", 0 "kontraŭ", 2 sindetenoj. Sekve *la Kontrol-revizia Komisiono estas reelektita ĉi-konsiste*.

4ĉ. Komisiitoj

GK anoncas sian pretecon resti *Komisiito pri la retlistoj*, se troviĝas neniu alia deziranto. GA anoncas, ke VA esprimis sian konsenton plu resti *Komisiito pri dokumentado*. Okazas voĉdonado: 13 "por", 0 "kontraŭ", 1 sindeteno. Sekve *Georgij Kokolija kaj Viktor Aroloviĉ estas reelektitaj kiel Komisiitoj.*

Krome estas voĉlegita propono de Valentin Seguru (VS) nomumi lin Komisiito *pri eternigo de la memoro de L.L.Zamenhof en Moskvo*. Temas pri memortabulo sur moskva domo, kie loĝis Zamenhof. Okaze de elektiĝo VS intencas formi grupon kiu helpus lin.

Okazas voĉdonado: 11 "por", 0 "kontraŭ", 3 sindetenoj. Sekve *Valentin Seguru estas elektita kiel Komisiito*.

LA 2-A KUNVENO – LA 23-AN DE OKTOBRO 2011

La kunvenon prezidas SS.

5. Ceteraj diskutindaj punktoj

5a. La sekva REU-Konferenco

Oni *rekomendas okazigi la 27-an Konferencon en 2013 en Vladimir*. La sekva REK-28 povas okazi en 2012 kadre de iu E-aranĝo. La decidon pri tio akceptos la Estraro poste. Ĉiuj voĉdonas "por".

5b. ILEI

Estis diskutita la situacio post la likvido de la rusia sekcio de ILEI. *Por reestabli la rusian ILEI-sekcion estis rekomenditaj kiel rusia ILEI-reprezentanto SS, kiel sekretario – Jelena Nadikova*.

Ili, kun helpo de ceteraj estraranoj, okupiĝu pri la afero. Ĉiuj voĉdonas “por”.

5c. Retaj projektoj

Mikaelo Ĉertilov proponis sin por la posteno de Komisiito pri retaj projektoj kaj klarigis, kion li intencas fari ĉi-terene. Ĉiuj voĉdonas “por”.

SS fermas la konferencon.

Protokolis G. Arosev
Ĉeboksari, la 23-an de oktobro 2011

Noto. *Decidoj de la Konferenco ne estas publikigataj kiel aparta dokumento. La ĉefaj decidoj (substrekitaj kaj kursivigitaj) estas ekstrakteblaj el la Protokolo.*

Suplemento 1. Raporto de la Estraro

Membroj

En 2010 estis registritaj 425 membroj (54 dumvivaj, 91 individuaj, 11 familiaj, 269 aligitaj), en 2011 estis registritaj 371 (55 dumvivaj, 9 mecenataj, 59 individuaj, 6 familiaj kaj 242 aligitaj) membroj. Ĉefa malkresko estas pri la individuaj membroj – 91 en 2010 kontraŭ 59 en 2011. Aliflanke estis enkondukita nova membrokategorio “mecenato”, kiu iĝis relative sukcesa. Alia nova membrokategorio “amikoj de REU” evidentiĝis ne tute sukcesa – aliĝis tro malmultaj. En 2012 la Estraro planas restigi tiun kategorion, tiucele ni planas reklami ĝin pli aktive inter tiuj, kiuj mem dubinde membriĝos. Aliĝis du novaj kluboj – tiu el Novoĉerkassk kaj Junulara Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko. Ne rekotizis por 2011 “Arĝenta flamo” (Jekaterinburg), “Kariljono” (Sankt-Peterburg) kaj unu el la du volgogradaj kluboj (“Venko”).

Oficejo

La oficejo ĉe Grafskij pereulok, kiun aranĝis por REU Valerij Sipoviĉ, jam ne ekzistas, ĉar la domposedantoj ne plu konsentas senpage doni la ejon.

Informado kaj la reto

Regule aperas Bulteno de REU, kiun kompilas Georgij Kokolija kaj dissendas Grigorij Arosev (rete) kaj Jurij Karcev (papere). Ĉiuj novaĵoj aperas en la reto sufiĉe rapide. La retejo de REU estis sukcese renovigita (fare de Andrej Grigorjevskij), dank’

al tio ĝi ne nur fariĝis pli moderna, sed ankaŭ ekhavis plurajn oportunajn funkciojn. Enretigo de REGo en la formato PDF estis farita nur duone, pro tio ni ĝis nun ne anoncis la aferon. La retejo "e-kluboj.ru" ankoraŭ ne estas same sukcesa.

Aranĝoj

Kun morala subteno de REU okazis RET en Gelenĝik, kaj kun plena subteno – REK-27 en Ĉeboksari.

Suplemento 2. Raporto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU por la jaro 2011

La komisiono ekzamenis prezentitan kasan libron (retkopion) kaj konstatis:
La librotenado ekzistas nur en formo de manskribita kasa libro. La skribmaniero estas tre bona. Ĉiuj operacioj estas registritaj. Fontoj kaj destinoj de pagoj estas indikitaj.
Estas kelkaj monenspezoj pri kiuj la Estraro ne estis informita kaj ili estis traktitaj kiel donacoj al REU. La monsumoj ne estas konsiderindaj.
En la kasa libro ne estas divido laŭ la fondusoj (la fonduso "Dumvivaj Membroj", "La Dua Jarcento de Esperanto", EK-MASI ktp). Pro tio ne eblas kontroli elspezon de monoj laŭ la Fondusoj kiel postulas la Statuto.
Banka konto ne estas. Ĉiuj monsumoj estas pagataj al personaj kontoj de la Estraro (la bankaj, retaj, poŝtaj, poŝaj). KRK rekomendas almenaŭ fari unu specialan retadreson por ke la pagantoj povu informi pri la celoj de la pago kaj la kontrolantoj povu kontroli tiun informon.
Ĉiuj ricevitaj monoj estis elspezitaj por la statutaj celoj de la organizaĵo, kontraŭcelaj uzoj de monrimedoj ne estis malkovritaj.
Ĉi tiu konkludo estis farita surbaze de analizo de retkopio de la kaslibro kaj telefona parolado kun la Estraro. Laŭleĝaj financaj dokumentoj forestas. KRK rekomendas organizi normalan librotenadon.

Prezidanto de KRK O.Ciganov
Membroj de KRK G.Basov, L.Novikova

Suplemento 3. Amendoj al la Ĝenerala Regularo kaj Regularo pri la fonduso de REU "Dumvivaj Membroj"

№	Dokumento	La ĝisnuna vortumo	Proponata vortumo
1	Ĝenerala Regularo	2.7. – nekotizado dum kalendara jaro;	2.7. – nepagado de la jarkotizo ĝis la 1-a de julio de la sekva jaro;
2	Ĝenerala Regularo	*(nova artikolo)*	2.11. Ĉe aliĝo aŭ eventuala reregistriĝo la membroj kaj kandidatoj indikas siajn aŭtentajn nomojn (ne pseŭdonimojn), kiuj poste estas reproduktataj sur la Membrokartoj, en membrolistoj de REU kaj en aliaj

			oficialaj tekstoj.
3	Ĝenerala Regularo	*(nova artikolo post art. 3.4; la numeroj de sekvaj artikoloj ŝanĝiĝas konforme)*	3.5. Se estas teknika ebleco, membro de REU povas registriĝi en la Konferenco distance, ricevante la rajton partopreni en debatoj kaj voĉdonoj.
4	Ĝenerala Regularo	**4. SKRIBA VOĈDONADO** 4.1. Okaze de neceso en la interkonferenca periodo konforme al la Statuto (art. 3.9) povas okazi skriba voĉdonado per decido de la Estraro aŭ peto de ne malpli ol 20% de la membraro. 4.2. Pri kvanto de voĉoj, disponigataj al la kolektivaj membroj, decidas la Estraro. 4.3. La Estraro elektas responsulon pri la skriba voĉdonado, kiu sendas (transdonas) la tekston de la propono kun po unu balotilo al ĉiuj membroj, samtempe informante pri la maniero de la voĉdonado kaj pri la limdato por resendo de la balotilo. 4.4. La voĉdonantoj indikas, ĉu ili voĉdonas por aŭ kontraŭ la propono aŭ esprimas sindetenon kaj resendas (transdonas) la balotilon kun surkoverta indiko "voĉdonado" al la indikita adreso. 4.5. La malfermadon de la kovertoj kaj nombradon de la voĉoj efektivigas la responsulo helpe de du membroj de REU. Ĉiuj membroj rajtas ĉeesti.	**4. SKRIBA VOĈDONADO** 4.1. Okaze de neceso en la interkonferenca periodo konforme al la Statuto (art. 3.9) povas okazi skriba voĉdonado per decido de la Estraro aŭ peto de ne malpli ol 20% de la membraro. 4.2. La voĉdonado okazas plejparte retpoŝte kaj en la oficiala retejo de REU (por membroj, ne komunikintaj retadresojn, – paperpoŝte). 4.3. La Estraro nomumas el inter membroj de REU tripersonan komisionon pri la skriba voĉdonado, kiu sendas (transdonas) la tekston de la propono kun po unu balotilo al ĉiuj membroj, samtempe informante pri la maniero de la voĉdonado kaj pri la limdato por resendo (transdono) de la balotilo. 4.4. La voĉdonantoj indikas, ĉu ili voĉdonas por aŭ kontraŭ la propono aŭ esprimas sindetenon kaj resendas (transdonas) la subskribitan balotilon kun temlinia (surkoverta) indiko "voĉdonado" al la indikitaj adresoj. 4.5. La kontroladon de la respondoj kaj nombradon de la voĉoj efektivigas la komisiono. Ĉiuj membroj rajtas ĉeesti.

		4.6. Ne validas balotilo, kiu alvenis post la fiksita limdato, kiu estas kopio de la originala balotilo, aŭ kiu estas skribita ne laŭ la preskribita maniero. La rezulto de la voĉdonado (difinata laŭ la Statuto kaj la art. 3.10 de tiu ĉi Regularo) estas publikigenda en la Organo de REU.	4.6. Ne validas balotilo, kiu alvenis post la fiksita limdato, kiu estas plenigita ne laŭ la preskribita maniero aŭ ne subskribita. La rezulto de la voĉdonado (difinata laŭ la Statuto kaj la art. 3.11 de tiu ĉi Regularo) estas publikigenda en la Organo de REU.
5	Regularo pri la fonduso de REU "Dumvivaj Membroj"	*(nova artikolo post art. 4; la numeroj de sekvaj artikoloj ŝanĝiĝas konforme)*	5. La Fondusa Konsilio dufoje jare raportas al la Estraro.

UEA KUN PLI DA MEMBROJ OL LASTJARE KAJ 2500 AMIKOJ EN FACEBOOK

UEA notis du gravajn ciferojn la 16-an de novembro: la nombro de individuaj membroj superis la pasintjaran nombron kaj la nombro de la ŝatantoj de la paĝo de UEA en Facebook atingis 2500.

En 2010 la definitiva nombro de individuaj membroj de UEA estis 5288. La 16-an de novembro la ĉi-jara nombro jam estis 5292. Ĉar malfruaj kotizpagoj daŭre enfluas, la nombro plu kreskos kaj superos 5300 en la oficiala statistiko, kiu inkluzivos la pagojn registritajn plej laste meze de marto 2012 kaj aperos en la aprila numero de *Esperanto*.

Depende de la kotizkategorio, ankaŭ tiuj, kiuj malfrue pagos la ĉi-jaran kotizon, ricevos, krom la Jarlibro aŭ Gvidlibro 2011, ankaŭ ĉiujn ĉi-jarajn numerojn de la revuo *Esperanto* kaj de la revuo *Kontakto* de TEJO.

La paĝo de UEA en Facebook estis kreita en novembro 2009. Du jarojn poste ĝi ricevis sian 2500-an "ŝatanton". Ĉirkaŭ 1500 ŝatantoj vizitas la paĝon minimume unufoje monate. Plej multe da ŝatantoj estas en Usono (282), Brazilo (213), Francio (155), Hispanio (122), Italio (119), Pollando (117), Germanio (98), Meksiko (82), Argentino (75) kaj Rusio (61). El tiuj, kies sekso estas konata, 27,4% estas virinoj kaj 72,6% viroj. Laŭ la aĝo la ŝatantoj distribuiĝas jene: ĝis inkl. 17-jaraj – 2,5%, 18-24-jaraj – 14,2%, 25-34-jaraj – 22,4%, 35-44-jaraj – 17,2%, 45-54-jaraj – 18,9%, minimume 55-jaraj – 19,8% (5% ne anoncis la aĝon).

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA KAJ TEJO AKTIVAS ĈE UNESKO

La 36-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko estis inaŭgurita en Parizo la 25-an de oktobro kaj daŭris ĝis la 5-a de novembro. Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unesko ekde 1954, partoprenis ĝin kiel

invitita observanto pere de siaj konstantaj reprezentantoj en Parizo: Renée Triolle, Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo.

Kiel prezidanto de la Ĝenerala Konferenco estis elektita la hungara Unesko-ambasadorino Katalin Bogyay, konata pro sia laboro por interkultura dialogo kaj antaŭenigo de kultura diplomatio. En sia inaŭgura parolado la ĝenerala direktorino Irina Bokova elstarigis: *La defioj de paco kaj daŭripova evoluigo nuntempe situas en edukado, scienco, kulturo kaj kundivido de scioj. Ĉio ĉi postulas pli fortan rolon de Unesko.*

La 26-an kaj 27-an de oktobro kadre de la Konferenco okazis "Forumo de Gvidantoj", kun partopreno de pluraj ŝtatestroj, pri la temo *Kiel Unesko kontribuas al la konstruado de kulturo de paco kaj al daŭripova evoluigo?* Alia kulmino estis la plenkunsido de la 2-a de novembro, kiu estis dediĉita al la 10-a datreveno de la adopto de la *Universala Deklaracio de Unesko pri Kultura Diverseco.*

De la 17-a ĝis la 20-a de oktobro okazis la 7-a Junulara Forumo, kies temo estis *Kiel junularo kondukas ŝanĝon* kaj kiu celis prepari rekomendojn al la Ĝenerala Konferenco. UEA ricevis inviton ĉeesti ankaŭ ĝin kiel observanto kaj delegis kiel reprezentantojn du aktivulojn de sia junulara sekcio TEJO: Veronika Poór kaj Nico Huurman. Ambaŭ partoprenis aktive en la diskutoj de la Forumo. Iliaj atentigoj pri la neceso gardi lingvan diversecon kiel esencan parton de kultura diverseco ricevis apogon de pluraj aliaj reprezentantoj. Mencio pri lingva diverseco tamen ne eniris la finan raporton, kiu estis aprobita esence tia, kia ĝi estis preparita antaŭ la Forumo. La raporto tamen rekomendas al la membroŝtatoj de Unesko kreskigi la konscion de la junularo pri la bezono konservi la palpeblan kaj nepalpeblan kulturan heredaĵon, kaj enhavas plurajn aliajn rekomendojn, kiujn UEA kaj TEJO dividas.

Rakontas judo al sia kolego:

Hieraŭ mi diris al mia edzino: "Tio sufiĉas por mi! Mi iras for! Mi pretas eksedziĝi!". Kiam mi eliris el la hejmo, mi aŭdis bruegon de pafo... "Ŝi verŝajne mortpafis sin", mi pensis. Mi tuj revenis hejmen, kuris en la loĝoĉambron kaj vidis, ke... ŝi malfermis botelon da ĉampano!

juda humuraĵo de Josef Shemer

Gazetaraj Komunikoj de UEA

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2011

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Klimov Dmitrij (Moskvo)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

JEAĈR (Ĉeboksari) (+ 1 membro): *Nadikova Jelena*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/membrolisto/>.

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2012

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Individua kotizo – 200 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 20 eŭroj) ĝis la 29-a de februaro 2012, 250 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 25 eŭroj) ekde la 01-a de marto 2012; inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, Bultenon de REU en elektronika formo (laŭpete – en la papera) kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU.

Mecenata kotizo – 500 rub.; inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo, krom unu escepto: sur la membrokarto estos skribita "Mecenato de REU".

Dumviva kotizo – 5000 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 500 eŭroj); inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 100 rub.; inkluzivas la membrokarton, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. La familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj, dumvivaj aŭ mecenataj membroj.

Kolektiva membrokotizo – 70 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj); inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por kluboj kun 5-15 aligitaj membroj kaj por ĉiu aldona deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 300 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage; inkluzivas partoprenrajton (sen voĉdonrajto) en Konferenco de REU, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Oni rajtas aliĝi kiel "Amiko de REU" nur unufoje. Persono, sin anoncanta "Amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj mencii sian retadreson.

Rabatita abono de REGo – 450 rub. (ekster Rusio – 20 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Ĉiuj membroj de REU en la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilojn, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo sendu (poŝtmandate) al: ***142717, Московская область, Ленинский район, п/о Развилка, до востребования, Наталье Николаевне Шороховой***; eblas ankaŭ pagi per la sistemo **Yandex-denjgi**, numero de la "monujo" estas ***41001612527392***. La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.

Eksciu, ke...

VOJAĜO AL LA LANDO DE MATENA FREŜECO

Antaŭnelonge grupo de vladivostokaj esperantistoj el 6 personoj revenis el la Suda Koreio, kie ĝi partoprenis la Komunan Esperanto-Kongreson de Japanio kaj Koreio, kaj post la kongreso ĝi konatiĝis kun pitoreskaj lokoj de Seulo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. La kongreso okazis de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 2011 en la Centra Trejnado-Instituto de Korea Saemaul-Movado (apud Seulo).

La kongresa temo: *Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro*.

La nombro de la partoprenintoj de Komuna Kongreso: el Koreio – 131, el Japanio – 177, el ceteraj landoj (Rusio, Mongolio, Ĉinio) – 11, sume – 319. Paralele kun la kongreso okazis la Komuna Seminario (KS) inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj, kiu estis ankaŭ bonega oportuno por la junaj aktivuloj, kiuj kunlaboros por IJK en 2012, okazonta en japana pitoreska insularo Okinavo. La ĉefa temo: *Etaj Esperantaĵoj en nia vivo*. KS-on partoprenis 42 gejunuloj el Koreio, Japanio, Ĉinio, Mongolio, Aŭstralio, Usono kaj Germanio. Dum la kunsidoj okazis multaj interesaj renkontiĝoj inter rusiaj kaj eksterlandaj jam konataj kaj nekonataj samideanoj. Niaj klubanoj interŝanĝis interesajn E-librojn kun samideanoj el ĝemela korea urbo Pusan. Tri tagoj de la Komuna kongreso traflugis tre rapide. Nek vizitoj de vendejoj por aĉeto de memoraĵoj, nek spektado de Seulaj stratoj tra vitro de turista aŭtobuso prezentis tion, kion donis neforgeseblaj renkontiĝoj kun koreaj kaj japanaj esperantistoj.

Ĉar mi mem ne povis partopreni la Komunan kongreson, je mia nomo vicprezidanto de nia klubo Gennadij Ŝlepĉenko salutis la partoprenintojn de la Kongreso kaj transdonis la plenan tekston de mia salutmesaĝo (vidu sube).

La nova lernojaro 2011/2012 en nia klubo komenciĝis de la kursoj por studentoj de la novfondita For-Orienta Federacia Universitato (FOFU) kaj por pensiuloj, kiuj lernas en la Supera Popola Lernejo ĉe la FOFU. Venontjare novaj lernantoj planas partopreni kelkajn E-kongresojn en la najbaraj landoj.

Aleksandr Titajev (Vladivostok)

Salutmesaĝo al la partoprenantoj de la Komuna Esperanto-kongreso de Japanio kaj Koreio kaj Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj:

Karaj kaj estimataj geamikoj kaj gesamideanoj! Je la nomo de Rusia Esperantista Unio kaj Vladivostoka Esperanto-klubo “Pacifiko” mi salutas vin okaze de la Komuna Esperanto-kongreso de Japanio kaj Koreio kaj Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj kaj deziras al vi fruktodonan laboron!

Bedaŭrinde dum la nuna kunveno mankas rusiaj junaj esperantistoj, sed future, mi pensas, tiuj reprezentantoj aperos.

La ligoj inter rusiaj for-orientaj esperantistoj kaj esperantistoj de Japanio, Koreio kaj Ĉinio komenciĝis jam delonge, precipe kun japanoj kaj ĉinoj.

Vladivostoko estas konata al la E-mondo antaŭ ĉio dank' al la rememoroj de Vasilij Eroŝenko kaj Julio Baghy. Dum la lastaj 20 jaroj ĝin vizitis esperantistoj el Japanio, Ĉinio kaj Koreio.

Sed la historio de E-movado en Vladivostoko kaj Fora Oriento havas komencon en 1891 – Fjodor Postnikov, veninta el Sankt-Peterburg por militservi, fondis en Vladivostoko la unuan Esperanto-grupon kaj en 1901 refondis ĝin kiel Vladivostokan filion de Sankt-Peterburga E-societo "Espero".

Gvidante la Vladivostokan filion de Esperanto-societo de 1901 ĝis 1905, Fjodor Postnikov klopodis disvastigi Esperanton en Japanio. La fama japana verkisto Futabatej Ŝimej (Hasegaŭa), lerninte ĉe Postnikov lecionojn de la internacia lingvo, en 1906 publikigis la unuan lernolibron por japanoj. Tie sur unu el la paĝoj estas presita portreto de Fjodor Aleksejeviĉ Postnikov kun la subskribo "Patro de Esperanto movado de Japanio".

La regionon Primorje oni nomas perlo de Fora Oriento de Rusio. Ĉi tie estas unika kolekto de mondkonataj plantoj kaj bestoj. La tera internaĵo estas riĉa je mineraloj. La naturo kaj ties riĉaĵoj konsistigas la ĉefan bazon de la regiona ekonomio, servas al evoluo de industrio kaj agrikulturo.

Vladivostok, fondita en 1860, estas la ĉefa urbo de la regiono kaj unu el la plej grandaj urboj de Rusia Fora Oriento. En Vladivostok komenciĝas la Transsiberia fervojo, pertrajna distanco ĝis Moskvo – 9288 km.

En Primorje loĝas reprezentantoj de pli ol 100 etnoj kaj popoloj. Inter ili plejpartas rusoj, ukrainoj, koreoj, tataroj, belorusoj, popoloj de eksa Sovetunio kaj aborigenoj. Antaŭ unu jaro oni komencis eldoni la unuan en Rusio revuon de regionaj popoloj "Utro Vostoka" (Mateno de Oriento). La eldonon efektivigas la Asocio de la koreaj organizoj de la regiono Primorje. Ĉiujare en Vladivostok kaj Primorje oni organizas la festivalon de regionaj etnaj kulturoj, dum kiu oni prezentas etnajn muzikon, dancojn, kantojn, kuirartojn, faritaĵojn k.a.

Nuntempe Primorje kaj Vladivostok preparas sin al la Pintkunveno de ŝtatestroj de Azi-Pacifikaj landoj, kiu okazos en septembro 2012 kaj estos dediĉita al ekonomia kunlaboro. Tiu evento devas kontribui ankaŭ evoluon de E-movado en nia regiono. Ja Vladivostok kaj aliaj urboj de Primorje havas ĝemelajn rilatojn kun multaj urboj de Koreio (Busan), Japanio (Akita, Hakodate, Niigata, Curuga, Otaru, Majdzuru) kaj Ĉinio (Daljanj). Krome ekzistas konvencioj pri kultura, ekonomia, scienc-teknika kunlaboro kun aliaj urboj de Azi-Pacifika regiono.

Kvar usonaj riĉuloj – tri nejudoj kaj judo Cohen, – vespermanĝis kune kaj diskutis pri financaj temoj.

Braun: "Mi havas multe da mono. Mi planas aĉeti *Citibank*."

Chong: "Mi havas abundon da mono. Mi deziras aĉeti *General Motors*."

Rodriguez: "Mi estas tre riĉa. Mi intencas aĉeti *Microsoft*."

Venis la vico de Cohen. Ĉiuj rigardas lin atende. Li iom tusetas, trinketas el sia teo kaj trankvile diras: "Mi ankoraŭ ne decidis ĉu mi vendos ilin."

juda humuraĵo de Josef Shemer

Estonto de la E-Movado dependas ankaŭ de aktivaj kontaktoj kun eksterlanda esperantista junularo. Se temas pri Siberio kaj Fora Oriento, certe, la movado firmiĝos, se ofte renkontiĝos junaj esperantistoj el najbaraj regionoj de Rusio, Koreio, Japanio kaj Ĉinio. La urbo Vladivostok ankaŭ estas tre oportuna loko por tiuj renkontiĝoj. Bedaŭrinde dum la nuna komuna seminario pro la financaj malfacilaĵoj mankas rusiaj junaj esperantistoj, sed future, mi opinias, tiuj reprezentantoj aperos.

Ni evoluigu kune la E-movadon en Azi-Pacifika regiono. Sukcesojn al vi!

Estime kaj samideane Aleksandr TITAJEV,
prezidanto de E-klubo PACIFIKO,
reprezentanto de REU en Fora Oriento de Rusio

MALFERMA TAGO: OMAĜO AL SEKELJ, REPREMIERO DE HISTORIA FILMO

La 35-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26-an de novembro allogis 70 vizitantojn el 11 landoj. La ĉefan prelegon faris Spomenka Štimec pri la vivo de la mondvojaĝanto, ĵurnalisto, verkisto kaj movada aganto Tibor Sekelj (1912-1988). La 14-an de februaro pasos 100 jaroj de post lia naskiĝo, pro kio Eŭropa Esperanto-Unio deklaris la jaron 2012 *Jaro de Tibor Sekelj* kaj ankaŭ la Komitato de UEA rekomendis priatenti la datrevenon. La prelego de Štimec estis do kvazaŭ enkonduko al la jaro. Ĝi estis filmita kaj estos baldaŭ videbla en la Reta Kinejo de UEA.

En sia alia kontribuo al la programo Spomenka Štimec, unu el la plej konataj nuntempaj Esperanto-aŭtoroj, parolis pri sia verkista agado. D-ro Ziko van Dijk, prezidanto de *Wikimedia Nederland*, parolis pri la libera reta enciklopedio Vikipedio. Krome, deko da interesitoj revenis al la Centra Oficejo en la posta tago por la seminario "Libera scio: kulturo de disdonado". Ili konatiĝis kun la filozofio malantaŭ Vikipedio kaj ricevis trejnadon ne nur pri ĝia uzado, sed ankaŭ pri tio, kiel mem kontribui al ĝia enhavo. La seminarion gvidis Ziko van Dijk kaj Vikipedia aktivulo Marek Blahuš.

En la programo estis ankaŭ du filmoj. La unua, *Vojaĝo al Marseille*, estas 45-minuta dokumento produktita de *Esperanto-Filmo Germanujo* pri la partopreno de la germana esperantistino Injo en la Universala Kongreso en Marsejlo en 1957. Malgraŭ la titolo la filmo enhavas ankaŭ fragmenton pri la UK en Kopenhago en la antaŭa jaro. Biblioteko Hodler ricevis la filmon siatempe donace de Joachim Giessner, unu el ĝiaj aŭtoroj, kaj UEA ciferecigis ĝin lastatempe. Parte en UK-oj estis farita ankaŭ la alia montrita filmo, *The Universal Language* (La Universala Lingvo), de la usona reĝisoro Sam Green.

La Malferman Tagon finis tradicie la programero "Estraranoj respondas", dum kiu Vicprezidanto Claude Nourmont, Ĝenerala Sekretario Barbara Pietrzak kaj estrarano Loes Demmendaal respondis demandojn pri la aktuala agado de UEA. La libroservo estis bone vizitata, kaj ĝiaj vendoj sumiĝis je 2176 eŭroj. Apud verkoj de Sekelj kaj Ŝtimec plej multe vendiĝis la tute nova disko *Amindaj* de la samnoma kuba muzikgrupo kaj la ĵus aperinta numero 12 de *Beletra Almanako*.

La sekva Malferma Tago okazos sabaton, la 28-an de aprilo 2012 kaj estos dediĉita al la 50-jara funkciado de la Centra Oficejo en la domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

MIA PARTOPRENO EN IO ĜIS NUN NEVIDITA

Eble la titolo de mia artikoleto aspektas iom intrigante, sed ĝi vere respegulas miajn impresojn pri la reala aranĝo, okazinta en la plej granda urba biblioteko de Jekaterinburg, la 4-an de decembro ĉi-jare.

Tie en tiel nomata *artgastejo* de la fremdlingva fako de la biblioteko okazis la unua prezentado de senaktora filmo pri Esperanto, kiu nomiĝas "La Universala lingvo" kaj estis farita de profesia usona kinoreĝisoro, Oskar-nomumito, Sam Green.

Organizis tiun prezentadon Aleksandr Osincev, kiu ĉi-somere rolis kiel ĉeforganizanto kaj direktoro de la Unua Internacia Kinofestivalo de filmoj en kaj pri Esperanto, okazinta dum Tutamerika E-Kongreso kaj Brazila nacia E-kongreso en San-Paŭlo (onidire, la kinofestivalo furoris!). Laŭ la rakonto de A.Osincev, tiu ĉi filmo malfermis la festivalon.

Sed mi revenu al nia aranĝo. Aperinte en la artgastejo de la biblioteko, la partoprenantoj povis konatiĝi kun ekspozicieto de la lasttempe aperintaj novaj E-libroj, prezentitaj de A.Osincev, kaj stoko de E-libroj el la rezervo de la biblioteko mem. Poste la ĉeestantojn de la salono salutis la estrino de la fremdlingva fako, menciante, ke ĉe la fako jam delonge funkcias kinokluboj, kiuj prezentas filmojn en la angla, germana kaj franca lingvoj, sed ŝi neniam eĉ pensis, ke iam staros antaŭ esperantistoj, ĉar, kiel multaj homoj nun, opiniis la lingvon Esperanto delonge forgesita; tial estis agrabla miro por ŝi, ke ŝi tamen eraris. La estrino volonte invitis esperantistojn daŭrigi siajn kinoprezentadojn kaj partopreni ankaŭ aliajn eventojn de la biblioteka

vivo.

Poste Aleksandr Osincev proponis al ni komenci la prezentadon de la 5-minuta videoraporto pri la Unua E-Kinofestivalo en San-Paŭlo, post kio okazis duonhora prezentado de la filmo de Sam Green. Tuj post la filmo estis aktiva opini-interŝanĝo pri la vidita. La plej granda parto de opinioj de la ĉeestantoj pri la filmo estis pozitiva, kvankam Aleksandr rakontis, ke dum la kinofestivalo en Brazilo la publiko dividiĝis je du grupoj: tiuj, kiuj la filmon ŝatis, kaj tiuj, al kiuj ĝi ne tre plaĉis, ĉar ili opiniis, ke ĝi devus esti pli reklama.

Fine okazis kvizo kun demandoj pri la prezentita filmo kaj gajnintoj ricevis diskojn "Esperanto estas...". Tri ekzemplerojn de la disko Aleksandr donacis ankaŭ por la biblioteko.

A.Osincev organizis tiun ĉi prezentadon unuavice por la lernantoj de du aŭtunaj E-kursoj, kiujn li gvidis, kaj kun la celo estonte eble krei sian E-kinoklubon. Sed partopreni la eventon estis invititaj ankaŭ kelkaj malnovaj esperantistoj de la urbo. Entute estis 22 partoprenantoj, inter kiuj 4 neesperantistoj, unu el kiuj eĉ tre aktive esprimis sian pozitivan opinion pri la filmo kaj interesiĝis pri la ebleco lerni la lingvon.

Mi ĝojas, ke la unua prezentado de E-filmo en la urba biblioteko sukcesis, kaj esperas, ke tiaj prezentadoj iĝos pli-malpli regulaj kaj eble eĉ estos kreita E-kinoklubo en Jekaterinburg.

Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)

ATENTU LITERATURAN KONKURSON

En 2012 “Impeto” iĝos 20-jara. Dum tiuj jaroj la eldonejo aperigis 129 librojn en kaj pri Esperanto. Okaze de la venonta jubileo ni organizas konkurson de literaturaj recenzoj. Partopreni ĝin povas ajna esperantisto, kiu sendos recenzon pri ajna libro de “Impeto” al la konkursa adreso. Recenzoj povas esti jam publikigitaj, novaj, subskribitaj per la veraj nomoj aŭ per pseŭdonimoj. Ni atendas *literaturajn* recenzojn, t.e. ke ili unuavice malfermu la sencon de la verko aŭ ĝia parto, klarigu problemojn, kiujn levis la aŭtoro, montru aktualecon (aŭ ne-) de la verko, faru komparon kun verkoj de aliaj aŭtoroj.

La konkurso okazos en du etapoj:

1. La venintaj recenzoj estos publikigataj en Interreto, kie eblos esprimi sian opinion pri la recenzo kaj aljuĝi poentojn povos iu ajn deziranto.

2. La recenzoj, kiuj ricevos pli multe da poentoj, estos juĝataj de niaj aŭtoroj mem. La plej bonaj recenzoj estos publikigitaj en REGo kaj “Scienco kaj Kulturo”. La aŭtoroj de la plej interesaj recenzoj ricevos de la eldonejo pormemorajn donacojn, la gajninto – 100 eŭrojn.

Recenzoj estas akceptataj laŭ la retadreso <recenzo@impeto.ru> ĝis la 30-a de oktobro 2012, pri la rezultoj de la konkurso ni anoncos la 15-an de decembro 2012. La solena honorigo de la gajnintoj okazos decembre de 2012 en Moskvo.

Pliajn informojn trovu en la retpaĝo <trovu.com/plumo>.

“Impeto”

IKU INVITAS PRELEGONTOJN

Dum la 97-a UK en Hanojo okazos la 65-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU: *prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo; rete <amri@huji.ac.il>, ĝis 2012-01-31.*

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝitaj de la IKU-komisiono kaj sekve la Estraro de UEA decidos, kiuj estos akceptitaj. La proponintoj estos informitaj pri la decido plej

laste 2012-04-30. La sukcesaj kandidatoj devos sendi kompletan tekston de siaj prelegoj al UEA ĝis 2012-05-31 por publikigo en la IKU-libro.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per honorario 250 eŭroj. Pliaj detaloj kaj antaŭaj IKU-prelegoj kaj – resumoj troviĝas en <http://uea.org/dokumentoj/IKU>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2012

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 63-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 97-a Universala Kongreso en Hanojo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en UK nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo Infanlibro de la Jaro.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita;

Prozo: maksimuma longo 200 × 65 karaktroj (kvino da paĝoj);

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita;

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo "Esperanto – ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo", proksimuma longo 400 × 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas "Luigi Minnaja";

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2010. Unu premio.

Ĉiujn konkursaĵojn – en unu ekzemplero escepte de tiuj por la infanlibra branĉo, havigendaj en kvar ekzempleroj, – oni devas sendi al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe *Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio*, aŭ prefere rete al <michela.lipari@tiscali.it>, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas 2012-03-31.

Premioj: unua premio 250 eŭroj, dua premio 175 eŭroj, tria premio 100 eŭroj; Nova Talento 175 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 525 eŭroj.

Laŭ decido de la Komitato de UEA la branĉoj Kanto kaj Filmo estas suspenditaj, ĝis oni decidos pri ilia estonteco.

Detala regularo estas havebla ĉe UEA.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Marija Koĉetkova kun la filino Toma dum la 1-a MLFL

La 16-a Lingva Festivalo en Ĉeboksari

La 1-a Moskva Lingva Festivalo por lernejanoj

☺ AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ ☺

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – en artikoloj kaj informoj, senditaj por REGo:

diskutrodo (anst. diskutrondo)
estiamataj (anst. estimataj)
kakula komisiono (anst. kalkula)
novegaj (anst. norvegaj)
paroprenis (anst. partoprenis)
JoMo salvumas (anst. slavumas)
venturos (anst. veturos)
verkisoj (anst. verkistoj)

FELIĈAN NOVAN JARON AL ĈIUJ!